



EL POPOLO

ČINIO

中国报道

12 1987





Lerno de irado

Foto de CAI MING

Enhavo

Respondeca sistemo de fabrikestro — reformo de ĉinaj entreprenoj	2
La plej granda subĉiela karbominejo entreprenata de Ĉinio kaj alia lando	6
VOJAĜO LAŬ JANGZI-RIVERO (12): Kunfluejo de tri riveroj	58
JUBILEA JARO DE ESPERANTO:	
Pensoj fine de jubileo	13
Neforgeseblaj tagoj en Jugoslavio	15
Lingvistikaj trajtoj de Esperanto kaj ĝia maŝin-traktado	18
ESP-NOVĴOJ	22
POR KOMENCANTOJ: Mia instruisto; Donaco de patrino	20
Bokso en Ĉinio	33
Akupunkturo kaj kaŭterizo servu al pli da suferantoj	36
POR VIA SANO: Masaĝo (III)	40
NOVELO: Rankoro	47
ĈINA LITERATURO:	
Poemoj de frua Tang-dinastio	50
Kvar poemoj el frua Tang-dinastio	53
Liŭ Ŝjaŭĉing — filma stelulino de Ĉinio	54
ĈINAJ ARTOJ: Freskoj de Ĉinio	26
La unua vaks-homfigura ekspozicio de Ĉinio	44
Ili ne estas senkoheraj kiel sableroj	68
Laiko, viva budho, civilulo	65
Kazaĥoj sur stepo (Kolora bildoserio)	9
TRA NIA LENSO: Sur strato ĉe Hŭangpu-rivero	41
Progresanta porplenaĝula edukado en la mondo	67
ENCIKLOPEDIETO DE ĈINIO: Naŭ grandaj pasejoj en Ĉinio	70
AMUZO	57
KURANTAJ AFEROJ	38
KORESPONDI DEZIRAS	24, 35

SUR LA KOVRILO: Geamantoj sub vinberuoj (Ujgura ĝenro)

de SA GENGŜI

INTERNE DE LA KOVRILO: Lerno de irado

Foto de CAJ MING

INTERNE DE LA DORSKOVRILO: ĈINAJ POSTMARKOJ

SUR LA DORSKOVRILO: Hŭangŝan-monto en vintro

Foto de LU KAJDI

Respondeca sistemo de fabrikestro — reformo de ĉinaj entreprenoj

Nun la respondeca sistemo de fabrikestro, kiel reformo de la gvida sistemo de ĉinaj entreprenoj, disvastiĝas tra la lando. Ĝis la fino de junio 35 232 el la ĉinaj industriaj entreprenoj de la tutpopola posedsisistemo (63.9% de la samspecaj entreprenoj) praktikis la sistemon, kio alportis profundan ŝanĝiĝon al la entreprenoj.

LA POVO KAJ RESPONDECO DE FABRIKESTRO

En 1984 oni komencis provi la respondecan sistemon de fabrikestro en industriaj entreprenoj de la tutpopola posedsisistemo. Longe antaŭ tiu

jaro oni praktikis la respondecan sistemon de fabrikestro sub la gvido de la partia komitato de la fabriko. La mankoj de tia sistemo de kolektiva gvido estis, ke la partiaj aferoj ne apartiĝis de la administraj, la povo disiĝis de la respondeco kaj la fabrikestro havis nenian povon. Rezulte, la respondeca sistemo pri administrado de entrepreno ne povis esti bone praktikata, kio malhelpis levi la aktivecon de la fabrikestro, oficistoj kaj laboristoj kaj disvolvi produktadon.

Antaŭ ol praktiki la respondecan sistemon de fabrikestro, ledŝua fabriko de Ŝanhajo elmetis ĉiujn gravajn problemojn pri produkta admi-


La estro de la Ĉongĉing-a Kvara Ŝtala Fabriko (la unua de maldekstre) kaj laboristoj



nistrado al sia partia komitato, por ke ĝi diskutu pri ili, kaj la fabrikestro mem ne povis fari decidon. Ĉar multaj komitatanoj ne okupiĝis pri produkta administrado kaj malmulte sciis pri produktado, produkta kvalito kaj merkato, estis malfacile bone diskuti pri gravaj problemoj pri produktado. La principo de la partia komitato estas, ke la malplimulto obeu la plimulton. Kiam la fabrikestro, kiel komitatano, estis ĉe la malplimulto, li do povis decidi nenion en gravaj problemoj. Nun la leĝo de la ŝtato klare difinas, ke la fabrikestro prenu sur sin unuigitan gvidon super produktado kaj entreprenado de la fabriko kaj respondecu pri ĉio. Tio radikale ŝanĝis la gvidan sistemon, ke la sekretario de la partia komitato estas la ĉefo de la fabriko. Post kiam la ledŝua fabriko praktikis la respondecan sistemon de fabrikestro, ĉi tiu ekhavis la decidpovon entrepreni la fabrikon kaj la povon administri produktadon kaj enoficigi laboristojn kaj baldaŭ aperis en la fabriko vigla gvido, rapida decido kaj bonefika laboro.

Foje reprezentanto de franca kompanio venis al la fabriko por peti specimenojn de ledŝuoj, kiujn li devis kunporti al sia lando post du tagoj. Se oni diskutus tion en kunveno de la partia komitato, la tempo certe ne sufiĉus por fari ledŝuojn. Por sukcesigi la aferon, la nova fabrikestro Lu Ĉengĝong decidis tuj organizi

La estro de la Sanhaja Dua Ĉemiza Fabriko montras produktaĵon al alilandaj komercistoj.



projektistojn kaj veteranajn laboristojn. En unu kaj duona tagoj ili faris ok parojn da ŝuoj de nova tipo. 10 tagojn post la reveno de la reprezentanto la franca kompanio mendis 100 000 parojn da tiaj ŝuoj.

La sistemo havigis al la fabrikestro la rajton proponi kandidatojn al la postenoj de vicfabrikestroj, respondeculoj de la fabriko pri ekonomio kaj tekniko kaj administraj funkcioj ĉe la meza nivelo. La kandidatoj de vicfabrikestroj devas esti ekzamenitaj de la supera instanco kaj la nomumo kaj eksigo de la meznivelaj administraj funkcioj — plenumitaj de la fabrikestro. Tio estas la plej ĉefa punkto en la reformado de la gvida sistemo de la entrepreno. La Pekina Fabriko de Pezaj Maŝinoj estas granda entrepreno. Nelonge post sia enoficiĝo, fabrikestro U Zongĝjang kuraĝe proponis promocii kapablojn kun politika konscio kaj malpromocii la sentaŭgulojn, vidinte, ke multaj kadroj de la filio de la ŝtala fabriko havas malaltan kvaliton kaj la produktado ne prosperas. Neatendite, tio sensaciis en la filio kaj oni multe diskutis pri tio.

Iuj diris: “Tro, tro! Eĉ se ni ne estus multe kontribuintaj, ni almenaŭ multe ŝvitis dum la dekoj da jaroj!” Aliaj diris: “Mi rigardu, kion li faros kun mi?”

U Zongĝjang turnis la dorson al tio kaj lia propono baldaŭ efektiviĝis. La nova estraro de la filio montris grandan kapablon, kvankam ĝi engaĝis nur du malnovajn estraranojn. En 1985, la unua jaro de praktikado de la respondeca sistemo de fabrikestro, la profito de la filio duobligis. En 1986 ĝi okupis la duan lokon en la Pekina Fabriko de Pezaj Maŝinoj.

La Ŝtata Ekonomia Komisiono kaj aliaj organizoj alvokis en la kunveno okazigita antaŭ nelonge, ke oni praktiku la respondecan sistemon de fabrikestro en ĉiuj industriaj entreprenoj grandaj kaj mezgrandaj de Ĉinio en la nuna jaro kaj en ĉiuj industriaj entreprenoj de la tutpopola posedsistemo antaŭ la fino de la venonta jaro.

ŜANĜIĜO DE LA ROLO DE LA PARTIA KOMITATO

Post la transiro de la respondeca sistemo de fabrikestro sub la gvido de la partia komitato al tiu de fabrikestro, la fabrikestro estas la reprezentanto de la leĝa persono de la entrepreno, kiu plene respondecas pri la produkta administrado de la entrepreno kaj ludas la centran ro-

lon. Tamen tio ne signifas nuligi la gvidon de la partia komitato, sed ŝanĝi tradiciajn konceptojn pri la partia komitato.

La Kvara Tekstila Fabriko de la urbo Ŝiĝaĝuang, Hebej-provinco, komencis praktiki la respondecan sistemon de fabrikestro en 1985. La membroj de la partia komitato bone komprenas, ke la entrepreno ne estas politika organizo, sed ekonomia unuo de komercaĵa produktado kaj administrado, kaj ke tiu, kiu reprezentas la fabrikon, ne estas sekretario de la partia komitato, sed nur fabrikestro. La partia komitato devas turni sian atenton de traktado de la ĉiutagaj administraj aferoj ĉefe al garantiado kaj kontrolado de plenumado de ĉiuj politikoj ellaboritaj de la partio kaj ŝtato, subteni la fabrikestron en lia administrado de la entrepreno, por ke la entrepreno disvolviĝu laŭ la socialisma vojo. Tiucele, tuj post sia enoficiĝo Ĝaŭ Mingĉang, la sekretario de la partia komitato de la fabriko, bone kunlaboris kun fabrikestro Ĝang Zŭobin kaj difinis ses principojn por sia ĉiutaga laboro: Unue, en plenumado de la partiaj kaj ŝtataj politikoj far la fabrikestro, la sekretario devas ludi rolon de kontrolanto kaj garantianto kaj pacience kaj zorgeme fari ideologian laboron inter oficistoj kaj laboristoj. Due, la sekretario devas firme subteni la gravajn decidojn faritajn de la fabrikestro pri la produkta entreprenado kaj administrado. Trie, kiam la fabrikestro estas tro okupita, la sekretario devas multe helpi lin. Kvare, kiam la fabrikestro estas ne juste riproĉata, la sekretario devas subteni lin. Kvine, kiam la fabrikestro renkontas malfacilojn en laboro, la sekretario devas doni helpon al li. Kaj sese, kiam la fabrikestro ne bone pripensas iujn aferojn, la sekretario devas rimarkigi lin kaj doni al li konsilojn.

La ago de Ĝaŭ kortuŝis la fabrikestron. Dank' al lia bona kunlaboro, la fabrikestro rapide ŝanĝis la staton de malalta efiko, granda malŝparo, nebona devokonscio kaj ŝvelinta personaro kaj praktikas en la fabriko laŭkontraktan sistemon de entreprenado (la ŝtato kaj la entrepreno estas ligita per kontrakto. La ŝtato ne intervenas en la administradon de la entrepreno, kondiĉe ke ĉi tiu garantias plenumon de la laŭkontrakta laboro). Tiel leviĝis la aktiveco de laboristoj kaj oficistoj kaj altiĝis la kapablo de la entrepreno disvolviĝi kaj progresi. En la unua jaro de praktikado de la respondeca sistemo de fabrikestro la fabriko superplenumis la laŭkon-

traktajn normojn. La profito, kiun ĝi donis al la ŝtato, pliiĝis je 12.94% kompare kun tiu de 1984 kaj kreskis la enspezo de la laboristoj kaj oficistoj. La totala industria produktovaloro de la fabriko en 1986 superis 200 milionojn da jŭanoj kaj staris en la unua vico en la ŝtataj industriaj entreprenoj de Hebej-provinco.

DEMOKRATIA ADMINISTRADO

La modernaj sciencoj kaj teknikoj disvolviĝas de tago al tago. La gravaj decidoj de entrepreno koncernas sciojn multflankajn. Sed la fabrikestro ne povas koni ĉion kaj esti kompetenta pri ĉio. Do, la fabrikestro devas uzi la saĝon kaj talenton de la kolektivo dum praktikado de la respondeca sistemo de fabrikestro.

Post kiam la Pekina Lan-teksa Fabriko komencis praktiki la respondecan sistemon de fabrikestro, ĝia estro Ĝoŭ Ŭenkaj neniam facilanime faris decidojn pri la gravaj problemoj pri la disvolviĝo de la entrepreno, kiaj ŝanĝo de produktaĵa strukturo, efektivigo de grandaj projektoj kaj uzo de kapitalo. Por diskuti kaj solvi tiujn problemojn, li la unua elmetas sian opinion al la kunveno de la administra komitato de la fabriko, kiu konsistas el li kiel la ĉefo, ĉefinĝeniero, ĉefekonomikisto, sekretario de la partia komitato, prezidanto de la laborista sindikato kaj reprezentantoj de la laborista kaj oficista kongreso. Por elvolvi la saĝon de la kolektivo, li opinias necese perfektigi sistemon de kunvenoj. La fabriko decidis okazigi kunvenon por trakti ĉiutagajn laborojn unufoje ĉiusemajne, kunvenon de partiaj kaj fabrikaj funkciuloj unufoje duosemajne kaj laboristan kaj oficistan kongreson unufoje en ĉiu duonjaro. La fabrikestro raportas sian laboron periode al laborista kaj oficista kongreso. Krome, la fabrikestro, la sekretario de la partia komitato kaj la prezidanto de la laborista sindikato preskaŭ ĉiutage interŝanĝas opiniojn pri la laboro de la fabriko.

Laŭ difino de la ŝtato, la organo, per kiu la laboristoj kaj oficistoj de fabriko plenumas la rajton de demokratia administrado, estas kongreso de laboristoj kaj oficistoj. La Pekina Lan-teksa Fabriko nombras 2 900 laboristojn kaj oficistojn, el kiuj 182 estas elektitaj kiel reprezentantoj. La kongreso ne estas organo por decidi gravajn problemojn, sed havas grandan parolrajton. Ĝi havas decidpovon en problemoj koncernantaj la interesojn de la laboristoj kaj oficistoj, kiaj ellaboro de metodoj distribui monpremion kaj loĝdomojn kaj uzo de kolektiva



Reprezentantoj de laboristoj kaj oficistoj de la Ŝanhaja Trikejo juĝas la administrajn metodojn de la trikejo.

bonstatiga fonduso. Krome ĝi havas ankaŭ la rajton kontroli la laboron de diversnivelaj gvidantoj de la entrepreno kaj prezenti proponojn, premiojn, punojn, nomumojn kaj eksigojn ilin.

Nelonge post kiam la fabriko ekpraktikis la respondecan sistemon de fabrikestro en 1984, pro la granda ŝanĝiĝo de la bezono en la merkato estis malfacile por la fabriko reguligi la produktadon kaj vendadon kaj aperis malŝparo de krudmaterialoj kaj superstoko de produktaĵoj. Informiĝinte pri tio, la prezidanto de la laborista sindikato Ĝang Ĉengzaŭ tuj sendis enketojn en laborejo kaj trovis, ke unu el la kaŭzoj estas egalismo en distribuado de monpremio, kio ne povis levi la labor-entuziasmon. Li proponis al la fabrikestro, ke laŭkontrakte laboru la ofertistoj, teknikistoj kaj laboristoj. Dank' al tio, la fabriko post nelonge produktis novajn varojn bezonatajn de klientoj kaj tuj solvis la problemon de superstokado.

Tamen ne glate iris praktikado de la respondeca sistemo de fabrikestro en ŝtataj industriaj entreprenoj, ĉar la ĉina reformado nun estas en la periodo de anstataŭigo de la malnova sistemo per la nova, la malnova sistemo ankoraŭ konservas sufiĉe grandan forton de kutimo kaj

la nova sistemo neeviteble renkontos iujn malsukcesojn kaj deflankiĝojn en la reformado. Multe da kontraŭdiroj interne kaj ekstere de la entrepreno fine koncentriĝas al la fabrikestro kaj estas malfacile por li solvi ilin. Ekz., kvankam la entrepreno praktikas la respondecan sistemon de fabrikestro, tamen en iuj superaj instancoj oni ankoraŭ ne apartigis la partiajn aferojn disde la administraj kaj ankoraŭ ne donis al la fabrikestro tiujn rajtojn, kiujn li devas havi. Ĉen Li, la estro de la Pekina Televidila Fabriko, plendis: "Oni malpermesas altiĝi la prezon de televidiloj, sed liveras al ni krudmaterialojn je prezo pli alta ol tiu difinita de la ŝtato."

Por malaperigi la fenomenon, ke fabrikestroj konsideras nur la nunajn interesojn de la entreprenoj, sed ne ilian estontan disvolviĝon, la ŝtato difinis la limtempon de tri-kvin jaroj por servado de la fabrikestro kaj elpensis koncernajn rimedojn premiojn kaj punojn. Ĉar nun estas ankoraŭ profunda la penso pri la egalismo en distribuado, la fabrikestro ne povas gajni pli da premio, eĉ se li laboras bone. Se lia enspezo estas iom pli multa ol tiu de la aliaj, li estos riproĉata, tiel ke li ne povos bone fari la laboron. Tio, kompreneble, devas esti forigita en la reformado. □

La plej granda subĉiela karbominejo entreprenata de Ĉinio kaj alia lando

La subĉiela karbominejo Antajbaŭ, ĉe la limo de la gubernioj Pinglu kaj Ŝuoŝjan nordokcidente de Janmen-pasejo de Ŝanŝji-provinco, estas la plej granda el la entreprenoj kune administrataj de Ĉinio kaj aliaj landoj kaj ankaŭ unu el la plej grandaj subĉielaj karbominejoj en la mondo. La 10-an de septembro 1987 tiu moderna karbominejo kun totala investaĵo de ĉ. 650 milionoj da usonaj dolaroj

kaj jara produktokvanto de 15.33 milionoj da tunoj jam konstruiĝis kaj komencis funkcii.


La minregiono Pingŝuo, al kiu apartenas la karbominejo Antajbaŭ, situas ĉe la piedo de la antikva Granda Muro. Tie sub la tero kuŝas dek miliardoj da tunoj da bonkvalita karbo. La regiono kun dika karbotavolo estas facile ekspluatebla.

Kun la praktikado de la pord-

malferma politiko de Ĉinio la minregiono altiris en 1979 eksterlandajn entreprenistojn per siaj avantaĝaj kondiĉoj. D-ro A. Hammer, la direktoro de la Okcidenta Petrola Korporacio de Usono, dum sia vizito al Ĉinio en 1979 esprimis sian deziron ekspluati la karbominejon kune kun Ĉinio, doni la plej novan teknikan projekton de la 80-aj jaroj, apliki la plej novajn teknikojn kaj ekipaĵojn en la mondo

Vicĉefministro Li Peng (la dua de dekstre) kaj d-ro A. Hammer en la inaŭguro de produktado





Trajno transportanta karbon el la ĵus ekfunkciinta karbominejo Antajbaŭ

kaj importi internacie avangardajn administrajn metodojn.

La deziro de d-ro Hammer estis bonvena al Ĉinio. En 1980 la Ĝenerala Karbo-ekspluata Kompanio de Ĉinio kaj la Okcidenta Petrola Korporacio de Usono komencis oficialan intertraktadon pri la projekto de la karbominejo Antajbaŭ. Ekde junio 1982 ambaŭ flankoj esploris la efektivigeblecon de ekspluatado de tiu minregiono. Ĉar tio estis la plej granda el la unuaj projektoj kune ellaboritaj de Ĉinio kaj aliaj landoj, la koncernaj leĝoj pri investado de aliaj landoj en Ĉinio estis ankoraŭ neperfektaj, kaj plie tiam la karboprezo en la internacia merkato falis, tial la intertraktado stumble daŭris ses jarojn. En julio 1985 Ĉinio kaj Usono oficiale subskribis kontrakton. Laŭ la interkonsento Ĉinio respondacas pri la surtera konstruado kaj liverado de laborfortoj, kaj Usono investas por minekspluatitaj ekipaĵoj kaj teknika servo.

Antajbaŭ estas la unua ĉina minejo, kiu enviciĝis inter la internacie avangardaj minejoj en

la meza periodo de la 8-a jardeko. Ĝi uzas internacie avangardajn ŝovelmaŝinojn kaj kamionojn. Ĉe sia ekfunkcio la minejo jam posedis pli ol 200 karbo-ekspluatajn ekipaĵojn grandajn kaj akcesorajn. Ili estas ĉefe 3 hidraŭlikaj ŝovelmaŝinoj, ĉiu kun volumeno de 15 kubmetroj kaj 8 elektraj ŝovelmaŝinoj, ĉiu kun volumeno de 25 kubmetroj, kaj 2 elektraj ŝovelmaŝinoj, ĉiu kun volumeno de 23 kubmetroj, kaj 34 450-ĉevalpovaj buldozoj. Oni lavas karbon per internacie avangarda peza perilo, manipulas karbolavan ekipaĵon per aŭtomata koncentra elektronika regado kaj traktas karbolikvaĵon per hermetika cirkulado.

La tuta produkta procezo, de la fosado de surfaca tera kaj roka tavolo kun karbo ĝis la lavo, elekto kaj transportado de karbo, estas regata de komputilo. Ekz., oni transportas lavitan karbon al stacio per vagonaro, kiu estas aŭtomate ŝarĝata dum veturado. Tuj kiam la vagonaro estas plenŝarĝita, la nomplato pri karbospeco, vagon-volumeno kaj eksped-stacio jam estas pretigita.

Fine oni ŝprucigas emulsion sur la surfacon de la karbo, por ke ĉi tiu ne poluciu la medion dum ventado. Por ŝarĝi unu vagonon necesas nur unu kaj duona minutoj, kaj ĉiutage estas ŝarĝeblaj 1 000 vagonoj, ĉiu kun kapacito de 50 tunoj.

Akcepto de tiel nova teknologia projekto kaj tiel novaj teknikoj kaj ekipaĵoj en la 80-aj jaroj estas provado de la investa medio kaj la kapablo de la ĉinaj konstruistoj.

Laŭ la kontrakto la norma konstru-periodo por la minejo Antajbaŭ, de ĝia ekfosado ĝis la atingo de ĝia projektita produkta kapablo, devas esti 26 monatoj. Se okazus prokrasto, la prokrastinto devus kompensi la perdon de la alia flanko ĉiujare.

La 13-a Metalurgia Konstrua Kompanio de Ĉinio prenis sur sin la taskon konstrui la produktan regionon de Antajbaŭ.

Por venki la transportan malfacilon, oni adoptis la novan metodon apartigi pli-ol-60-tunajn maŝinojn, kiel granda ŝovelmaŝino kun volumeno de 25 kubme-

troj unuafoje importita en Ĉinion. Laŭ normo de iuj landoj por munti unu tian ŝovelmaŝinon necesas tri monatoj. Do oni bezonas du jarojn por veldi kaj munti la ok ŝovelmaŝinojn. La supre menciita kompanio prezentis kontraktan proponon, ke ĝi plenumu la taskon en unu jaro por sukcesigi la konstruadon en la difinita tempo.

Sub la gvido de inĝeniero Ĝja Hongmo 17 veldistoj sin trejnis 18 tagojn en fabriko de ŝovelmaŝinoj de alia lando. Reveninte, ili komencis veldi kaj munti la ŝovelmaŝinojn. Laŭ la aktualaj kondiĉoj Ĝja Hongmo faris kvar grandajn modifojn al la velda teknologio proponita de la usona flanko. La ĉinaj laboristoj alterne laboris tagnokte kaj stiris la unuan ŝovelmaŝinon en la labor-

lokon nur post 45 tagoj. Ili veldis kaj muntis ĉiujn ok ŝovelmaŝinojn nur en ok monatoj.

En la konstruado de la minejo estis multaj tiaj brilaj ekzemploj. Ekz., oni konstruis nur en 14 tagoj karbotenejon kun alteco de 31 metroj kaj spano de 46.5 metroj kaj el 29 A-formaj trusoj. La difinita plano postulas unu monaton. La tunelo de la tenejo, kun areo de 25 000 kvadrataj metroj, estis antaŭdate konstruita kaj plene konfidata sen ekzameno.


Post kiam la minejo komencis produktadon, ĝia plej granda fiksita nombro de la laboristoj estis 1 720, ĉiu kun taga produktokvanto de 30 tunoj. Ĝia labor-efiko estas la plej alta en Ĉinio. Ĝi aplikas modernajn

administrajn metodojn, severe defiante la tradiciajn ĉinajn administrajn metodojn, kio certe akcelos la aperon de ĉinaj talentaj administrantoj.

La sukcesa konstruado de la granda moderna entrepreno, kune investita de Ĉinio kaj Usono je komuna risko kaj por komuna profito, estas rezulto de apliko de modernaj ekipaĵoj kaj superaj sciencaj administraj metodoj kaj intima kunlaboro de la ĉinaj kaj usonaj konstruantoj. Ĝi estas sukcesa ekzemplo de praktikado de la pordmalferma politiko de Ĉinio. Ĝi certe ludos pozitivan rolon por akceli modernigon de la ĉina karba industrio, venigi eksterlandan kapitalon kaj importi avangardajn teknikojn kaj administrajn metodojn. □

LOKOJ MENCIITAJ EN ĈI TIU NUMERO

1. Ŝanhajo
2. Ŝiĝjaĝuang
3. Antajbaŭ
4. Leŝan
5. Ĉinhuangdaŭ
6. Ĉangping-gubernio
7. Fanŝi-gubernio
8. Dajŝjan-gubernio
9. Ĝjajuguan
10. Pingŝjang
11. Nankino



Kazaĥoj sur stepo

La kazaĥa nacieco de Ĉinio nombras pli ol 900 000 membrojn, kiuj plejparte vivas en la norda parto de la Ŝinĝjang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono kaj okupiĝas ĉefe pri brutobredado. Preskaŭ tutjare ili vivas nomadan vivon. Ili

estas modestaj kaj senĝenaj, afablaj kaj gastamaj. Ĉiuj kazaĥoj, ĉu viroj ĉu virinoj, ĉu junaj ĉu maljunaj, estas lertaj en rajdado, kantado kaj dancado. Tial, ĉiam sur la stepo aŭdiĝas gaja kantado kaj serena ridado.



Prilaborado de felto

Foto de ŜEN ĈEN



Paštado


Foto de JAN ĠIN



Ġojo en jurto

Foto de

HÜANG TAÜPENG




Kazaĥa maljunulo kun sia ĉasita aglo

Foto de HŪANG TAŪPENG

Al alia paŝtejo

Foto de SEN ĈEN





Nutrado de šafidj
Foto de ŠEN ĆEN

PENSOJ FINE DE JUBILEO

de HUMPHREY TONKIN



La aŭtoro

“Cent jaroj estas longa tempo. Ĉu vere Esperanto estas tiel maljuna?” Tiel esprimis sin antaŭ nelonge iu neesperantista kolego mia. Li ŝajne volis diri, ke tiu kreaĵo de la deknaŭa jarcento apenaŭ povus taŭgi por la fina parto de la dudeka. Eble

li forgesis, ke li parolas per la angla lingvo, kiu kreiĝis en la dektria kaj dekkvara jarcentoj, stabiliĝis en la dekkvina kaj dek-sesa, kaj restis ĝis la dekoka esence nur lingveto de kelkaj insuloj flanke de nordokcidenta Eŭropo.

Kaj apud la ĉina lingvo, la angla lingvo estas nur bubo nematura!

Ĉu cent jaroj estas efektive longa tempo? Por lingvo, ne. Mi mem, je mia iom granda surprizo, konstatis lastatempe, ke mi estas esperantisto jam preskaŭ unu trionon de la tuta historio de la lingvo: mi esperantistiĝis en 1955, kiam la lingvo havis nur 68 jarojn. Tamen, interne de cent mallongaj jaroj, Esperanto kreskis de sia naskiĝo en la menso de unusola homo al tutmonda disbranĉiĝo. Nun tiu lingvo kreita de iu nordeŭropa doktoro estas parolata en Hamburgo same kiel en Harbino, en Santiago kiel en Ŝanhajo, en Najrobo kiel en Nankino — laŭ

maniero komprenebla ĉie en la mondo kaj laŭ firme establitaj normoj.

Sed la Esperanto, kiun oni parolas hodiaŭ, ne estas la lingvo de Zamenhof.

Zamenhof kreis projekton, simplan skeleton de lingvo, kun malgranda vortprovizo kaj simpla gramatiko. Ene de cent jaroj, la lingvo ne nur disbranĉiĝis geografie, sed ĝi ankaŭ disbranĉiĝis esprime. Ĝin kreis la kreskanta nombro da esperantistoj, kiuj parolis kaj manipulis ĝin. Kvankam en la frua periodo Zamenhof gvidis per sia lingva ekzemplo, li lasis lokon al la ordinaraj esperantistoj, al la Esperanto-socio, kiuj eltrovis novajn vortojn kaj esploris la subtilaĵojn de tiu simpla kaj fleksebla lingva strukturo. Ne plu temas hodiaŭ pri la lingvo de Zamenhof, sed pri lingvo, kiu originis el Zamenhof, kaj kiun realigis la kolektivo de parolantoj kaj utiligantoj de Esperanto.



La aŭtoro kaj vicurbestro de Pekino s-ro Ĉen Haŭsu en la 71-a UK

Ene de cent jaroj, Esperanto ekestis kiel lingvo komuna, en plena senco de tiu epiteto.

Hodiaŭ ĝi estas plene uzbla por ĉiuj celoj — kompleta lingvo. Ni ja daŭre poluras ĝin, sed ni faras tion kvazaŭ al valora ujo, kiu samtempe utilas kaj belas. Efektive, ĝi tiel bone funkcias, ke multaj homoj jam kontentas utiligi ĝin por la propraj celoj sen granda interesiĝo pri ĝia tutmonda akceptiĝo. Al ili ne gravas la fina venko de la lingvo: ĝi ja tute bone utilas por internaciaj amikecoj, aŭ por fakaj interŝanĝoj, aŭ por vojaĝado aŭ legado. Oni estas devigata daŭre memori ilin, ke Zamenhof ne celis nur ilin per sia lingvo, sed la tutan mondon.

Aliflanke, Esperanto havas sian praan originon en la jam delonge ekzistantaj lingvoj.

Ĝi ne estas nur centjara, ĉar ene de ĝi troviĝas lingvaj elementoj konataj al Zamenhof laŭ la lingvoj, kiujn li kapablis. En la Esperanta vortprovizo troviĝas eŭropaj radikoj, kvankam la strukturo de la lingvo ne estas tiu de la plej oftaj eŭropaj lingvoj. La lingva projekto de Zamenhof estis kulmino de jarcentoj da aspiroj al tutmondeco: ĝi estis kulmino de difinitaj historiaj evoluoj. En la mondo, en kiu oni povas vojaĝi de unu flanko al alia ene de horoj, kaj povas mesaĝi de loko al loko ene de sekundoj, komuna lingvo estas nepraĵo. Same kiel normigitaj lingvoj ekestas iom post iom

en multaj ŝtatoj, normigita lingvo ekestis. Ĝi nomiĝas Esperanto. Ĝi estas parto de la natura historia evoluo, parto ankaŭ de la homa evoluo.

Kaj kion fari pri tiu novamalna, juna-maljuna lingvo en la dua jarcento de ĝia plena ekzisto?

Instrui ĝin. Lingvo, kiun oni ne lernas, fariĝas fosilio: la estonteco de Esperanto plene dependas de ĝia vasta utiligo.

Montri ĝin al aliaj. Lingvo en fermita rondo estas lingvo nur de klicko: ni devas montri al eksterstarantoj, ke nia lingvo funkcias kaj estas uzata.

Konvinki la instancojn subteni ĝin. Tiuj landoj, kiuj kredas je internacia kompreniĝo kaj ne timas, ĉar iliaj simplaj civitanoj povu senpere rilati kun simplaj civitanoj en aliaj landoj, rekonos en Esperanto mirindan fenomenon: paco kaj kompreniĝo iras man-en-mane, ĉar sen reciproka kompreno oni ne povas krei daŭran kaj firman pacon kapablan travivi portempajn perturbojn kaj kontraŭajn interesojn.

La Universala Kongreso en Varsovio estis brila komenco de la dua jarcento: la plej granda renkontiĝo de esperantistoj en la tuta historio de la lingvo. Brila estis la etoso. Impona estis la reago de la instancoj, de la gazetaro, de la publiko. La Jubileo de Esperanto mem vekis multegan interesiĝon ĉiuflanke. Necesas nun teni tiun entuziasmon, tiun interesiĝon, viva. Necesas kultivi kaj pligrandigi ĝin. Se la unua jarcento estis la jarcento, dum kiu Esperanto kreiĝis, la dua jarcento estu tiu, en kiu ĝi plene akceptiĝos. Granda tasko por la posteuloj de Zamenhof — sed tasko inda kaj plenumbla. □

NEFORGESEBLAJ TAGOJ EN JUGOSLAVIO

Post la 72-a Universala Kongreso de Esperanto, laŭ la kultura interkonsento de Ĉinio kaj Jugoslavio, kvar membroj de la Ĉina Esperanta Delegacio flugis de Varsovio al Jugoslavio kaj partoprenis la Manifestaĵon "100 Jaroj de E-kulturo" okazigitan en Zagreb de la 2-a ĝis la 19-a de aŭgusto. Post la manifestaĵo ni vizitis Beogradon, la ĉefurbon de Jugoslavio. La vizito impresis min profunde.

FLORO DE E-KULTURO

La Manifestaĵo "100 Jaroj de E-kulturo" okazigita kune de la Kroatia Esperanto-Ligo kaj Universala Esperanto-Asocio inaŭguriĝis vespere, la 2-an de aŭgusto, en la Kulturdomo de Trešnjevka de la urbo Zagreb. En la inaŭguro partoprenis proksimume 300 esperantistoj el 39 landoj. En ĝi parolis s-ino Neda Andriĉ, la prezidanto de la Organiza Komitato de la manifestaĵo, kaj s-ro Marijan Radmiloviĉ, membro de la prezidantaro de la Unuiĝo de Socialisma Laborpopolo de Kroatio. Ili laŭdis Esperanton en la internacia komunikado kaj esprimis varman bonvenigon al la partoprenantoj. Ili esperis, ke la manifestaĵo akcelos la Esperanto-movadon de Jugoslavio kaj tiun de la mondo.

La manifestaĵo abundis je programeroj kun novaj formoj.

Oni aŭskultis disertaĵojn kaj prelegojn kaj ankaŭ spektis teatraĵojn, filmojn, televid-filmojn, kantojn kaj dancojn, kaj vizitis vidindaĵojn.


Samtempe okazis la 20-a Pupteatra Internacia Festivalo de Jugoslavio kiel ĝia grava konsistiga parto. En la pupteatra festivalo riĉenhavajn programerojn prezentis artistoj de la gastiganto Jugoslavio kaj tiuj el Hungario, Italio, Sovetunio, Aŭstrio kaj Francio. La plejparto de tiuj programeroj estis vive prezentata en Esperanto. Tio refoje

atestis la praktikecon de Esperanto. Sendube, oni povas preni ĝin kiel internacian komunikilon, kiu povos ludi gravan rolon en politiko, ekonomio, kulturo, scienco, tekniko kaj popola vivo.

En la inaŭguro, jugoslavaj, hungara kaj kanada kantistoj kantis malsamstilajn kantojn en Esperanto.

La fama dramo "Hamleto" de Ŝekspiro estis prezentita en la manifestaĵo. La tutan dramon ludis nur du aktoroj kaj akiris sukceson, dank' al la brila aran-

Sceno el la pupteatro "Kandido"





Post la ludo de la dramo "Pikniko sur la Batalkampoj" la Bulgara Esperanto-Teatro dankas la rigardantojn.

ĝo de la reĝisoro de la Lenin-grada Esperanto-Teatro.

Andre Morel, ludanto de la pupateatro "Kandido" de Francio, gajnis la unuan individuan premion por bona uzo de Esperanto sur la scenejo kaj la premion por la plej bona parolkapablo de Esperanto ekster la scenejo en la pupateatra festivalo.

La internacia simpozio daŭris tutan tagon. La partoprenantoj esprimis siajn opiniojn pri la ĉefa temo "Lingvaj problemoj en internacia komunikado". Li Ŝiĝjun, estro de la ĉina delegacio kaj membro de la Akademio de Esperanto, faris paroladon pri "Lingvaj Problemoj en la Internacia Komunikado de Ĉinio".

S-ro Tiŝlar prezidis la internacian simpozion. Iuj legis siajn verkojn. Li Ŝiĝjun prezentis sian tradukon de fama ĉina verkisto.

Dum la manifestaĵo projekciĝis filmoj pri TEJO-Kongreso, instrumentado de Esperanto, Esperanta turismo k.a. Krome, prezentigis ankaŭ du bildbendaj filmoj pri Ĉinio. Unu el ili estis kun titolo "Ĉinio kaj Turismo" kaj la alia — kun titolo "Universala Kongreso en Pekino kaj postkongresaj aranĝoj". La prezentado daŭris pli ol 50 minutojn. La bildbendaj filmoj refoje konigis ĉinajn pejzaĝojn kaj la solenan kongreson kaj allogis multe da rigardantoj.

La 5-an de aŭgusto ĉiuj partoprenantoj de la manifestaĵo vojaĝis al la mondfama pitoreskejo Plitvice de Jugoslavio. En la loko kuŝas 16 grandaj kaj malgrandaj lagoj, kiujn kunligas sen-nombraj kaskadoj. Apenaŭ enirinte la lokon, ni estis tuj kaptitaj de la bela pejzaĝo. Nemalmultaj senĉese laŭdadis ĝin kun ekscitiĝo. Aliaj impro-

vizis versaĵojn en Esperanto, triaj, kunveninte, kantis Esperante kaj dancis gaje, manon en mano.

Dank' al la penado de la gastigantoj kaj ĉiuj partoprenantoj, la ĉi-foja manifestaĵo sendube havos aktivan influon sur la disvastigo de Esperanto, pluapaŝa disvolviĝo de la Esperanta movado kaj plifortigo de la amikeco inter diverslandaj esperantistoj.

VIVI EN LA MARO DE AMIKECO

Ĉie, kie ni estis, ni ricevis varman akcepton kaj amikiĝis kun multaj personoj. Dum la restado en Jugoslavio ni vizitis niajn perantojn kaj abonantojn.

Frumatene de la 2-a de aŭgusto, ni atingis la urbon Zagreb per aviadilo. S-ro Zlatko Tiŝlar (Bajo), membro de la Organiza Komitato de la manifestaĵo, persone aŭte veturigis nin al la Domo de Lernantoj, kie ni tranoktis dum la tagoj de la manifestaĵo.

Tagmeze, Esperanta verkistino s-ino Spomenka Ŝtimec, organizanto de la programo de la manifestaĵo, invitis nin gastigi ĉe ŝi kaj persone preparis bongustajn manĝaĵojn por ni. Ŝi estas tre okupita, tamen ŝi, profitante ĉian okazon, varbas novajn abonantojn por la gazeto EPC de multaj jaroj. Ni kore dankas ŝin pro ŝia amikeco al nia redakcio.

Post kelkaj tagoj Bajo invitis nin tagmanĝi kun liaj familianoj. Li preparis por ni manĝon laŭ la gusto de ĉinoj. Ĉiuj membroj de lia familio parolas Esperante. Gasti ĉe li estas vere aparta ĝuo.

En la manifestaĵo, vicurbestro de Zagreb akceptis la reprezentantojn de diversaj landoj. Li Ŝiĝjun, en la nomo de ĉiuj parto-

prenantoj, invitite faris parolon.

Je la fino de la manifestaĵo ni vizitis s-ron Milan Koĉiŝ, la prezidanton de la Kroatia Esperanto-Ligo, kaj Zlatko Tiŝljar kaj interŝanĝis kun ili opiniojn pri amikaj kontaktoj inter Esperantaj organizoj de Ĉinio kaj Jugoslavio.

En nia restado en Zagreb studentino Sanja Laziĉ servis kiel nia ĉiĉeronino. Ŝi serioze faris la laboron. Ŝi kunportis kun si du vortarojn por konsulti, kiam estis necese por ŝi. Ŝi rigardis nin kiel siajn amikojn. Ŝi progresis rapide kaj jam povis pli libere esprimi siajn pensojn post kelkaj tagoj de akompanado.

Precipe menciinde estas, ke ni amikiĝis kun sep afrikaj esperantistoj. Ili estas kantemaj kaj dancemaj, kaj fervoraj por Esperanta aktivado. Ili ĝoje akceptis niajn specimenojn de EPC kaj Esperantajn insignojn. Iuj el ili esprimis sian volon propagandi Esperanton inter siaj amikoj post reveno al la patrujo. Forte kortuŝis nin ilia fervoro al Esperanto. Ni deziras al ili ĝojigan sukceson kaj al la Esperanta movado en Afriko pli grandan disvolviĝon kiel en aliaj lokoj de la mondo.

Post la manifestaĵo ni veturis de Zagreb al Beogrado.

S-ro D. Milorad, entuziasma peranto de la gazeto EPC tre ĝojiĝis, informiĝinte pri nia alveno. La sekvantan tagon li veturigis nin per aŭto al la urbo Smederevo dekojn da kilometroj fore de Beogrado por viziti la Metalurgian Kombinaton de Smederevo, kie li laboras, kaj la tiean antikvan kastelon.

Tagmeze, la prezidanto de la sindikato de la kombinato rega-



Ĉinaj kaj afrikaj esperantistoj en Zagreb



Ĉinaj kaj kroatiaj esperantistoj

lis nin per bankedo en la Ŝiprestoracio sur Danubo. Post la bankedo ni rigardis laboristan somerumejon apud Danubo.

Dum tri tagoj, kiam ni restis en Beogrado, ni loĝis en la hejmo de esperantistino Saveta. La gemastroj kaj aliaj amikoj donis al ni fervoran prizorgon. Iu Esperanto-grupo de la urbo

invitis nin partopreni ilian aktivadon. Iu grupano ĉiuj ĝojis pro la alveno de la ĉinaj esperantistoj. Ili foje refoje brakumis nin. Iu maljuna esperantistino emocie diris: "La popoloj de Ĉinio kaj Jugoslavio estas ne nur kamaradoj, sed ankaŭ fratoj." La diro ĝuste esprimis la komunan volon de la popoloj de ambaŭ landoj. □

LI ŬEJ*:

LINGVISTIKAJ TRAJTOJ DE ESPERANTO KAJ ĜIA MAŜIN-TRAKTADO



La aŭtoro

LA REGULECO KAJ FLEKSEBLECO DE ESPERANTO

Esperanto estas tipa aglutina lingvo, kies gramatikaj finaĵoj kaj afiksoj havas sian apartan sencecon kaj povas kunmetiĝi. La finaĵoj kaj afiksoj estas regulaj, facilaj kaj konformaj al rekursiva prilaborado de maŝinoj. La algoritmo por fortranĉi finaĵojn kaj afiksojn de E-Ĉ/A-sistemo montras la avantaĝojn de tia rekursiva prilaborado. Oni povas libere krei novajn vortojn dank' al la aglutineco kaj libereco en kunmetado de radikoj de Esperanto. Ekzemple:

Ŝi rid-as. Ŝi estas rid-ema. Ŝi estas rid-emulo.

Ŝi estas rid-emulino. Ŝi estas rid-emulineto. . .

fonto-lingvo, celo-lingvo, ponto-lingvo, naci-lingvo. . .

En Esperanto ne ekzistas gramatikaj samformaĵoj, tial la sintaksaj rilatoj estas sufiĉe klaraj, kio estas tre favora por rekonado de homoj kaj maŝinoj, kaj tute ne ekzistas la problemo por diferencigi samformaĵojn en maŝin-tradukado de naciaj lingvoj.

La tensoj, voĉoj kaj tabelo de korelativaj vortoj de Esperanto estas mirindaj kreaĵoj. Per la nura help-verbo **esti** oni povas bone esprimi diversajn kompleksajn tensojn kaj voĉojn. La tabelo de korelativaj vortoj estas eksterordinare riĉa kaj konciza por esprimi semantikajn rilatojn. Ĝi estas tiel perfekta, logika kaj bela, ke ĉiuj esperantistoj spertas ĝian belecon, same kiel kemiistoj la Mendeleevan tabelon de kemiaj elementoj.

Esperanto sin karakterizas per laŭplaĉa transformado de vortospecoj, se nur la transformado ne kontraŭas al logiko. Ekzemple:

La flor-oj flor-as.

Li kant-as italan popolan kant-on.

Mi estas ĝoj-a.

Mi ĝoj-as.

En Esperanto malklariĝas la limo inter transitivo kaj netransitivo:

Mi iras./Iru vian propran vojon!

La tuta homaro parolos nur unu lingvon./
Mi parolas Esperante (en Esperanto, per Esperanto).

Malklariĝas la limo inter objektoj rekta kaj nereakta:

informi ion al iu/informi iun pri io

Malklariĝas la limo inter objekto kaj adjekto:

Mi invitas vin vojaĝi kun mi Pekinon.

Malklariĝas la limo inter radiko kaj afikso, inter derivaĵo kaj kunmetaĵo kaj inter nocia vorto kaj funkcia vorto, kiel ekzemple:

sekret-et-o/et-a sekreto

Jes./mi jes-as vian opinionon.

kred-ind-a/ne-ind-a/ind-igi/sen-ind-ulo

En Esperanto kreiĝis la ĉiopova prepozicio

je. Kiam oni esprimas sian penson, oni ofte sentas, ke ekzistas iagrada nebula determina rilato, sed ne povas diri klare kaj ne bezonas klare montri ilian semantikan rilaton. Por adapti la lingvon al tia nebuleco de homa pensado, Zamenhof genie kreis la prepozicion **je**. (Oni povas esprimi tian nebulan rilaton ankaŭ per fleksiaj formoj, kiel akuzativo kaj adverbo.)

En Esperanto estas unueco en la uzado de kazo kaj vortospeco. La vortospeco kaj kazo povas esprimi abstraktan semantikan rilaton pro sia mova sintaksa karaktero kaj kompletigi unu la alian. (Diferencante de la analizforma prepozitivo, prepozicioj en Esperanto estas uzataj ĝenerale por esprimi kompare konkretan kaj determinitan semantikan rilaton, escepte de la prepozicio **je**.) Ni komparu jenajn frazojn:

Mi skribas plum-e./Я пишу ручкой. (ruse)

Finaĵ-formoj en Esperanto, kvankam ne multaj, estas sufiĉe kompletaj kaj esprimriĉaj kiel en fleksiriĉaj lingvoj. Ni citu kazon kiel ekzemplon. Esperanto havas nur du kazojn, t.e. nominativon (nulformon) kaj akuzativon (kun la finaĵo "-n"). Kun la kazoj kaj vortospecoj kaj analizaj formoj de prepozicioj, Esperanto estas

tiel esprimriĉa kiel aliaj fleksiriĉaj lingvoj. La rusa lingvo estas unu el la lingvoj fleksiriĉaj, kun 6 kazoj. Estas ne malutile kompari la rusan lingvon kun Esperanto. Proksimume, la unua kazo de la rusa respondas al nominativo de Esperanto, la dua kazo al adjektivo (kun la finaĵo "-a"), la kvara kazo al akuzativo, kaj la kvina kazo al adverbo (kun la finaĵo "-e"). Nur la tria kazo ne havas sian respondan fleksian formon en la internacia lingvo kaj estas anstataŭata ĝenerale de la prepozicio "al". La sesa kazo per si mem ne esprimas difinitan semantikan rilaton kaj funkcias nur kune kun la prepozicioj "O", "Ha" kaj "B". Estas interese, ke en Esperanto prepozicioj povas esti sekvataj kaj de nominativo kaj de akuzativo, montrante nemovon kaj movon respektive. Kompare kun la simila uzo en la rusa lingvo, Esperanto estas multe pli simpla kaj perfekta.

En Esperanto estas sufiĉe libera vortordo.

Unuvorte, la trajtoj de Esperanto donas al homoj grandan liberecon de verkado en Esperanto kaj la plej bonajn kondiĉojn plene montri sian lingvan kompetentecon. Tia fleksebleco ne influas la rigoran neŝanĝeblecon de la 16 fun-

La aŭtoro (la dua de maldekstre) en la 71-a UK



Mia instruisto

de ĜINAT

Miaj gepatroj laboras en Ĉinio. Antaŭ du jaroj mi venis de Bangladeŝo al Pekino de Ĉinio kaj vizitis la elementan lernejon

Fangĉaŭdi. Tiam mi ne povosciis la ĉinan lingvon. Nun mi povas ne nur servi kiel interpretisto de miaj gepatroj, sed ankaŭ skribi artikolon en la ĉina lingvo. Mi ŝuldas la sukceson al mia ĉina instruisto Ŭang.

Instruisto Ŭang havas la aĝon de ĉ. 50 jaroj, en nigrakadraj okulvitroj. Li ĉiam tiel afable traktas nin, kvazaŭ siajn gefilojn. Mi komencis lerni en tiu lernejo

de la tria klaso. En nia grupo estis 12 lernantoj el 11 landoj. Ili ĉiuj iom konis ĉinajn ideografiaĵojn sed ne mi. En la unua leciono de la ĉina lingvo la instruisto donis humuraĵon al la lernantoj. Aŭdinte tion, la tuta klaso ridis. Tiu, kiu sidis kun mi ĉe la sama tablo, eĉ ridis ĝis larmoj. Sed, nur mi gape sidis kaj komprenis nenion. Nur post kiam iu el miaj kunlernan-

damentaj reguloj de Esperanto. Ĉi tie la libereco kaj rigoreco ekzistas harmonie. En Esperantujo ĉiuj estas kreantoj kaj ĉiuj povas ĝui la plezuron de tia kreado. Oni jam ne estas sklavo de lingvaj kutimoj.

Tamen oni ne povas ne konfesi, ke la fleksebleco kaj libereco de Esperanto alportis malfacilojn al aŭtomata maŝin-traktado. En la esplorado de E-Ĉ/A-sistemo ni profunde sentis, ke Esperanto kiel fontolingvo por maŝintradukado havas facilan kaj malfacilan flankojn. Unuvorte, la afero estas multe pli komplika, ol ni atendis. La facileco devenas de la alta reguleco de la lingvo, kaj la malfacileco — de ĝia alta fleksebleco.

ANALIZAJ KAJ SINTEZAJ FORMOJ

La alia elstara lingvistika trajto de Esperanto estas, ke ĝi havas la esencojn kaj de analiza lingvo kaj de sinteza lingvo. Oni povas esprimi iun semantikan rilaton aŭ per analiza formo (helpe de funkciaj vortoj) aŭ per sinteza formo (helpe de fleksioj). La du formoj, kompreneble, ne tute identiĝas. Ili sin montras diversastile. Ĝuste pro tio, Esperanto estas elasta kaj esprimriĉa. Kiel celolingvo, ĝi povas plej bone imiti la lingvistikajn karakterizaĵojn de originala verko, ĉu la mildan slavan stilon de libera vortordo, ĉu la kompaktan stilon de fleksimankaj lingvoj, kiel la ĉina kaj angla. Sube estas kelkaj ekzemploj de kunekzistado de analizaj kaj sintezaj formoj en Esperanto:

Analizaj formoj Sintezaj formoj

1. Tenso:

Mi estas skrib-**anta**. Mi skrib-**as**./Mi skrib-**antas**.

2. Voĉo:

Ĝi estas limig-**ita**. Ĝi limig-**itas**./Ĝi lim-**iĝas**.

3. Senco:

Tio estas **malgran-** Tio estas sekret-**eto**.
da (eta) sekreto.

4. Prepozicio kaj kazo:

Li parolas en (per) Li parolas Esperant-**e**.
Esperanto Li parolas Esperant-**on**.

5. Prepozicio kaj akuzativo:

Ŝi parolis **por 30** Ŝi parolis 30 minut-
minutoj **ojn**.

6. Transformiĝo de analiza formo al sinteza:

laŭ kutimo **laŭ**-kutim-**e**/kutim-**e**

En Esperanto ĉie videblas la kunekzistado de analiza kaj sinteza formoj, per kiu Esperanto diferencas de naciaj lingvoj. Kvankam ne ekzistas pura sinteza lingvo sen ajna analiza formo, nek pura analiza lingvo sen ajna sinteza formo, tamen ĉia nacia lingvo havas nur unu formon kiel la ĉefan: aŭ la analizan aŭ la sintezan, sed plejofte la du formoj ne ekzistas samtempe.

La supre diritaj montras, ke Esperanto estas tre fleksebla lingvo kun variaj esprimmanieroj kaj la granda fleksebleco de la lingvo konformas al la nebuleco de la homa pensado. La granda harmonio de la fleksebleco kaj reguleco de Esperanto estas vere mirakla kreaĵo lingvistika. □

* La aŭtoro estas esploranto de la Lingvistika Instituto sub la Ĉina Akademio de Socialaj Sciencoj. La artikolo estas la mallongigita dua parto "Esperanto: Lingvistikaj Trajtoj kaj Esplora Valoro" de lia pormagistrecita disertaĵo "La Eksperimento pri Aŭtomata Tradukado de E-Ĉ/A", kiu estis sukcese trapasita en majo 1986.

toj interpretis por mi, mi komprenis la enhavon. Tiam mi pensis: Kiel bone estus, se mi sciis la ĉinan lingvon. Pro tio mi decidis diligente lerni.

Estas ja malfacile lerni la ĉinan lingvon por la fremdlandanoj. Unue ni ofte eraris en prononcado de la ĉina lingvo. Kiam ni faris misprononcon, la instruisto pacience korektis nin foje-refoje, ĝis kiam ni prononcis ĝuste. Li ofte donis kroman



helpon al tiu, kiu ne bone komprenis la tekston. Ĉar mi estis nova lernanto, la instruisto helpis min pli multe, tiel ke mi iom post iom ellernis iujn ĉinajn ideografiaĵojn. Foje en leciono de la ĉina lingvo, mi ricevis aplaŭdon unue de la instruisto kaj poste de la kunlernantoj pro ĝusta respondo. Sekve la instruisto petis min legi tekston. Mia legado ankoraŭfoje ricevis laŭdon de mia instruisto, kaj por mi aplaŭdis ankaŭ la kunlernantoj. Mi ekĝojis kaj ekhavis pli da memfido pri lernado de la ĉina lingvo.

Post kelkaj monatoj mi revenos al mia patrolando. Kvankam mi tre volas reveni al la patrujo, tamen mi ne volas forlasi la lernejon Fangcaŭdi, nek

mian ĉinan instruiston. Mi pensis, ke en la estonteco mi certe revenos al Ĉinio por labori kaj viziti mian instruiston. □

Donaco de patrino

Estis infano, kiu perdis sian patrinon tuj post sia naskiĝo.

De tiam, li kreskis jaron post jaro sen la patrino. Poste, ĉiufoje kiam li vidis, ke aliaj infanoj ricevis donacon de sia patrino, li sentis grandan ĉagrenon: "Ho, kiel malfeliĉa mi estas! La patrino forlasis min tiel frue, ke ŝi eĉ ne povis ion donaci al mi!"

Iun tagon, la infano refoje ekpensis pri tio kaj ekploris korŝire. Li vagadis sola sur strato kun la okuloj vualitaj de larmoj kaj koliziis kontraŭ maljunulo.

La maljunulo ne koleris pro tio, tamen zorgeme demandis: "Kial vi ploras, infano?"

La infano elverŝis siajn malfeliĉon kaj ĉagrenon al la maljunulo.

Aŭdinte lian rakontadon, la

maljunulo diris serioze: "Vi eraris. Fakte, via patrino postlasis al vi la plej valoran donacon, kiun vi devas bone konservi!"

"Do. . . kial tion mi ne scias?" mire demandis la infano.

Karesante la kapon de la infano, la maljunulo kore diris: "Antaŭ ĉio, ekde la tago, kiam vi naskiĝis, la patrino jam donis al vi la tutan mondon kiel donacon. Ĉu tio ankoraŭ ne sufiĉas por vi?"

Je tio ekbrilis la okuloj de la infano.

La maljunulo daŭrigis: "Ne nur tion, via patrino donis al vi, sed ankaŭ la akrajn okulojn, por ke vi observu la mondon; la akrajn orelojn, por ke vi aŭskultu la mondon; paron da piedoj, por ke vi iru tra la mondo; kaj paron da manoj, por ke vi reformu la mondon. Ĉu ĉio ĉi ne sufiĉas por vi?!"

Tion aŭdinte, la infano dro-nis en meditado.

La maljunulo diris plue: "Mia kara, la plej grava donaco, kiun via patrino donis al vi, estas la koro plena de varma sango, por ke vi ne malŝparu la vivon — amu la mondon." □



ĈINA MEDICINISTA REPRESENTANTO RICEVIS HONORAN DIPLOMON KAJ MEDALON DE KOPERNIKO

En la 6-a Internacia E-konferenco de Medicinistoj Ŝen Ĉengju, medicina reprezentanto de la Ĉina Akademio de Sciencoj (ĈAS), vicprezidanto de la Sciencista-Teknikista Esperanto-Asocio sub ĈAS kaj ĉefredaktoro de "Tutmondaj Sciencoj kaj Teknikoj", ricevis honoran diplomon kaj medalon de Koperniko, kiuj estis fonditaj por laŭdi sciencistojn akirintajn sukcesojn en sciencoj aŭ kontribuintajn al apliko de Esperanto en la internacia medicina interŝanĝo.

La konferenco okazis de la 20-a ĝis la 24-a de julio en Krakovo, antikva urbo de Pollando. La ĉinaj reprezentantoj de la Sciencista-Teknikista Esperanto-Asocio sub ĈAS unuafoje ĉeestis tian konferencon kaj estis varme bonvenigitaj de diverslandaj reprezentantoj. Ŝen Ĉengju voĉlegis disertaĵon pri nova evoluo de la ĉina sanprotektado, Ĝang Hong tiun pri naskolimigo en Ĉinio kaj Ĝang Jan interpretis la bildobendan filmon "Akupunktura Anestezo", kio vekis grandan intereson de la ĉeestantoj. Multaj esprimis sian deziron lerni en Ĉinio ĝiajn medicinon, farmakologion, akupunkturon kaj mokson.

ĈINAJ ESPERANTISTOJ EN LA INTERNACIA KONFERENCO PRI ĈINLINGVA INFORMTRAKTADO

Okazis en Pekino de la 4-a ĝis la 7-a de aŭgusto la Internacia Konferenco pri Ĉinlingva Informtraktado (1987) organizita de la Ĉina Asocio de Ĉinlingva Informtraktado. Fakuloj el pli ol 10 landoj kaj regionoj voĉlegis disertaĵojn pri kodigo de ĉinaj ideografiaĵoj, diversaj ekipaĵoj kaj aplikaj sistemoj, maŝintradukado kaj naturlingva traktado. Liŭ Jong-

ĉjŭan, membro de la societo "Amikoj de Esperanto", kaj esperantistoj Ĉjaŭ Ji kaj Li Ŭej ĉeestis la konferencon kaj prezentis sian disertaĵon. La disertaĵo-temo de Li Ŭej estas "La Sistemo de Maŝintradukado de E-Ĉ/A kaj la Kombino de la Celo-lingvoj Ĉina kaj Angla", kiu prezentas la sistemon de la aŭtomata tradukado de Esperanto en la ĉinan kaj anglan lingvojn, sukcese ellaboritan sub la gvido de profesoro Liŭ Jongĉjŭan. Nur tiu disertaĵo temas pri komputila sistemo por Esperanto.

BRONZAJ STATUOJ DE LUSIN KAJ SUN JONG STAROS EN LA HEJMLOKO DE PETOFI

La hungara registaro decidis fondi parkon de skulptaĵoj en la hejmloko de fama hungara patriota poeto Petofi Sandor kaj starigi tie bronzajn statuojn de diverslandaj verkistoj kaj tradukistoj, kiuj plej frue tradukis en sian nacian lingvon verkojn de Petofi. Lusin kaj Sun Jong estis verkisto kaj tradukisto respektive, kiuj plej frue tradukis poemojn de Petofi en la ĉinan lingvon. Jam en 1929 Sun Jong tradukis "Johano la Brava" de Petofi el Esperanto en la ĉinan

lingvon. La traduko estis eldonita en 1931, sub la helpo de s-ro Lusin. Poste, li ĉinigis "40 Poemoj de Petofi Sandor". Por laŭdi la kontribuon de Sun Jong por la kultura interŝanĝo inter Ĉinio kaj Hungario, la Hungara Popola Respubliko donis al li labormedalon en 1958.

BONAJ SUKCESOJ DE LA E-KURSOJ POR INSTRUISTOJ

Por kulturi instruistojn por altlernejoj, la Ĉina E-Ligo, ricevinte la sankcion de la Ministerio de Eduko de Ĉinio, organizis ekde 1981 en la Pekina Fremdlingva Instituto kaj la Ŝanhaja Fremdlingva Instituto 6-foje E-kursojn por 81 instruistoj el 59 altlernejoj, 13 mezlernejoj kaj 2 elementaj lernejoj. Nun kelkdek altlernejoj jam funkciigis nedevidan E-kurson kun pli ol 5 000 lernantoj. Ankaŭ multaj aliaj altlernejoj, mezlernejoj kaj elementaj lernejoj funkciigis postlecionan E-kurson. Iuj altlernejoj jam fondis Esperantan Asocion. La 7-a E-kurso por instruistoj inaŭguriĝis antaŭ nelonge en la Ŝanhaja Fremdlingva Instituto.

La sovetunia 2.5-jara esperantistino Eva Habarova ŝatas ĉinajn porinfanajn librojn.





S-ro Karl Maier (la unua de maldekstre) kaj lia edzino (la tria de maldekstre) en la kunsido aranĝita de EPC-redakcio

GESINJOROJ MAIER EN ĈINIO

S-ro Karl Maier, malnova amiko de la ĉina popolo, kaj lia edzino vizitis Ĉinion en septembro laŭ invito de la Ĉina E-Ligo. Ili starigis profundan amikecon kun la ĉina popolo kaj ĉinaj esperantistoj dum sia kuraclaboro en Ĉinio de 1932 ĝis 1955 kaj tenis intimajn rilatojn kun la ĉinaj amikoj post sia reveno al la Germana Demokratia Respubliko. De multaj jaroj s-ro Maier kiel peranto de "El Popola Ĉinio", multe laboras por fortigi la amikecon inter la ĉina kaj germana popoloj kaj diskonigi ĉinajn Esperantajn eldonaĵojn. Dum ilia restado en Pekino la Ĉina Esperanto-Ligo, la redakcio de EPC kaj la Internacia Libro-Komerca Kompanio de Ĉinio aranĝis te-kunsidon por ili kaj donacis al ili memoraĵojn. La gastoj vizitis ankaŭ siajn malnovajn kuracan domon kaj loĝejon en Tjanĝin kaj vidindajn lokojn en Nankino, Suĝoŭ, Ŝanhajo kaj Hangĝoŭ. Ili estis bone akceptitaj de la lokaj E-organizo kaj la Ĉina Popola Asocio por Amikeco kun Fremdaj Landoj. Ili renkontiĝis kun novaj kaj malnovaj amikoj kaj skribis plian paĝon por la amikeco inter la du landoj.

LATINAMERIKA PERESPERANTA KULTUR-CENTRO (LAPEK)

Post pluraj klopodoj sukcesis plene la adekvataj kontaktoj inter multaj latinamerikaj intelektuloj kaj esperantistoj por disvastigi la kulturon latinamerikan per Esperanto kaj diskonigi Esperantan kulturon en Latinameriko. Nun sociologoj, historiistoj, ekonomikistoj, politikistoj, antropologoj, ĵurnalistoj, pedagogoj, poetoj, literaturistoj k.a. formas grandan informad-centron de Latinameriko en Kolombio.

LAPEK hispanigos el E-eldonaĵoj kaj manuskriptoj al ili senditaj artikolojn, eseojn, literaturaĵojn k.a. kaj proponas ilin al hispanlingvaj gazetoj kaj ĵurnaloj pere de la adreso de LAPEK.

Por akceli la kulturan interŝanĝon LAPEK eldonas ekde oktobro ĉi-jare modestan informilon "Latinamerika Memuaro" (3-foje jare), kiu kolektas valorajn verkaĵojn speciale direktitajn al Esperantujo. Ili volas ĝin interŝanĝi kontraŭ aliaj E-eldonaĵoj kaj distribui ĝin je 1 usona dolaro po ekzemplero.

LAPEK projektas kontakti kun aliaj E-organizo en la tuta mondo por daŭra kaj profitodona komuna laboro.

ESPERANTO-EKSPOZICIOJ

En Pollando: okaze de la centjara jubileo de Esperanto, la filio de la Pola Esperanto-Asocio en la urbo Gliwice organizis tritagan propagandan aranĝon en la sidejo de la urba Klubo de Internacia Libro kaj Gazetaro. Krom interesaj prelegoj "Kiel Esperanto sukcesas", "Esperanto en turismo" kaj "Esperanto en literaturo", oni preparis ankaŭ Esperantan ekspozicion en la daŭro de la tuta monato. Vicprezidentino de la urbo vizitis la ekspozicion.

En Irano: okaze de la centjara jubileo de Esperanto, la 30-an de

Vicprezidentino de la Urba Estraro, akompanate de la prezidentino de la filio de PEA, S. Mandrak, rigardas la ekspozicion de esperantaĵoj.



julio 1987 solene inaŭguriĝis en Tehrano la unua pentraĵ-ekspozicio de iranaj esperantisto-pentristoj. Ĉ. 60 personoj ĉeestis la inaŭguron.

La okazaĵo tiel vekis la entuziasmon de la vizitintoj, ke la plimulto insiste instigis kaj petis pri la baldaŭaj similaj ekspozicioj kaj gratulis la sukceson de la ekspozicio.

La unua pentraĵ-ekspozicio de iranaj esperantisto-pentristoj



KORESPONDI DEZIRAS

Tarifo: 1 internacia respondkupono por 5 vortoj aŭ mallongigoj. **Por fotoj: 1 intern. resp. kup.** por spaco de 1 linio. **Niaj perantoj kaj kunlaborantoj ĝuas 30% da rabato.** **Esp. organizoj povas senpage aperigi anonceton kun maksimume 50 vortoj.** **La redakcio ne respondecas pri la enhavo de la anoncetoj, nek pri la plenumado de la promesoj faritaj en ili.**

* Juna esp-grupeto dez. kor. tm. kaj kolektas pm., bk. E-gazetojn, ĵurnalojn kaj ankaŭ pri radio, fotografio kaj literaturo el diversaj landoj. Adr.: Wang Yixiang (30-j.), Nr. 066 Dangtu, Anhui 243100, Ĉinio.

* S-ro Zeng Qinghua (20-j. instruisto) dez. kor. tm. pri filozofio kaj interŝanĝo de pejzaĝaj fotoj, poŝtmarko, bk. kaj libroj. Adr.: Tongxin Zhong Xin Xiao, Liangpingxian, Sichuan, Ĉinio.

* Tang Feiming (28-j.) dez. kor. tm. kaj kolektas E-eldonaĵojn el eksterlandoj kaj ankaŭ pm., bk. Adr.: Suliao Chang, Zhuzhou, Hunan, Ĉinio.

* Pasia kolektanto de bk serĉas seriozajn kontaktojn kun samhobiuloj tutmonde: Leonid SENJ, P.K.-16, GB-5000 Veliko Târnovo, Bulgario.

* 29-j. studentino pri biologio dez. kor. kun ĉino pri biologio kaj aliaj temoj. Adr.: Felizitas Bruemmer-Willeckes, Annastr. 17, D-1000 Berlin 46, FR Germanio.

* Mi (14-j.) vol. kor. kun ĉinaj esperantistoj pri sporto kaj aliaj temoj Esperante. Adr.: Balázs Enihó, Szék út 6 Szám, Csikszere-do, J.Szám: 4100, Harghita, Rumanio.

* Gekursanoj, komencantoj (20-28-j.) dez. kor. tm. pri ĉiuj temoj. Respondo garantiata. Adr.: M. RADKOVICOVA, LM 336/3, CS-691 41 Břeclav 4, Ĉeĥoslovakio.

* S. Fischer deziras interŝanĝi pm. kaj stampojn. Adr.: ul. Bulgarska 8/8, PL-64-100 Leszno, Pollando.

* 21-j. lernanto dez. kor. kun tm. Cleber Neves. Rua Srg. Nicolau D.Farias, 406 BR-91900, Porto Alegre, RS, Brazilo.

* 48-j. nevidanta esp-isto serĉas korespondamikojn tm. pri ĉiuj temoj, ĉefe pri muziko, hejmelektro-

niko kaj kolektas diskojn, kasetojn kun muziko, helpbrajlaĵoj. S-ro Wladyslaw STASIOU, P.O. Kesto 518, 30-960 KRAKOW, Polsto 518, 30-960 KRAKOW, Pollando.

* Renee BERTHAUX deziras korespondi kun gepensiuloj tm. pri ĉiuj temoj. Adr.: 3, rue Pasteur, F-36000 Châteauroux, Francio.

* Emil Cizpanski deziras korespondi tutmonde. Adr.: BG 4230 Asenovgrad Str. Sini Vrôh 55, Bulgario.

* Mi dez. kor. tutmonde kun gesamideanoj. Adr.: Cherim Adina. Str. Iasomieii Nr. 1 Blok Lii, Sk. C, APT. 60, Tomis 3, Konstanta, Rumanio.



Cherim Adina

NOVELOJ DE LUSIN

(Plena kolekto)

Eldonita de la Fremdlingva Eldonejo, Pekino. 496p. Ilus. 21.5cm. Bind. 10-Es-1290S. £2,80 US\$4,80

Lusin (1881-1936) estas la plej fama verkisto de Ĉinio kaj ankaŭ fondinto de la moderna ĉina literaturo. Liaj ĉefaj noveloj estis verkitaj dum la jaroj 1918-1925. Ili klare spegulas la ŝanĝigojn de diversaj socitavoloj de la tiama ĉina socio, forte kritike la malluman realon kaj esprimante grandan simpatian al la suferantaj popoloj.



Ba Jin (1904-), fama verkisto kaj veterana esperantisto de Ĉinio. Nun li estas prezidanto de la Asocio de Ĉinaj Verkistoj, vicprezidanto de la Ĉina Esperanto-Ligo kaj ankaŭ membro de Honora Patrona Komitato de UEA.

Kiel esperantisto li tradukis kaj rekomendis al ĉinaj legantoj mallongan romanon *Prin-*



La kolekto enhavas ĉiujn 33 novelojn de la aŭtoro. La antaŭparolo al lia unua novelkolekto "Krioj", en kiu li klarigis kial li prenis literaturon kiel sian batalilon, helpas al la legantoj kompreni liajn novelojn. Al tiu ĉi volumo estas aldonitaj "Kronologiaj Notoj pri Lusin" kaj 20 tutaĵaj bonkvalitaj ilustraĵoj.

AŬTUNO EN LA PRINTEMPO

(1932)

Ba Jin (Bakin). Trad. Laŭlum. 1980. Eldonita de EPC. 116p. Ilus. 21cm. Broŝ. 10-Es-1525p. £2,40 US\$4,90

tempo en la Aŭtuno de Julio Baghy, kaj inversigis la titolon por nomi sian propran romanon, kiun oni rigardas kiel fratinan verkon de tiu de Baghy.

Tiu ĉi romano temas pri tragedia amhistorio de juna paro. La aŭtoro skribis: *Aŭtuno en la Printempo* estas ne nur milde larmanta rakonto, ĝi estas ankaŭ alvoko de unu tuta generacio de junuloj.

Mendu ĉe: **Libroservo de UEA**
Perantoj de EPC

aŭ **Esperanta sekcio de la Internacia Libro-Komerca Kompanio de Ĉinio (GUOJI SHUDIAN) P.O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio**

Freskoj de Ĉinio

de ĜUANG ĜAJI

La ĉinaj freskoj klasifikiĝis en kvar grupojn: la hala, hipogea, kaverna kaj templa.

Hala fresko: La halaj freskoj troviĝis ĉefe sur muroj de grandaj konstruaĵoj de imperiestroj kaj princoj. Historiaj notoj registris, ke jam en Ĝou-dinastio (9-a — 3-a jc. a.K.) estis fresko sur la muro de palaco, laŭdanta la meritojn kaj virton de la reganto Ĝou. Sed la antikvaj konstruaĵoj ĉefe el ligno facile difektiĝis, kaj malmultaj el ili konserviĝis ĝis nun. En la sesdekaj jaroj de la kuranta jarcento ĉinaj arkeologoj trovis, ĉe la ruino de Ŝjanjang, la ĉefurbo de

Ĉin-dinastio (221-206 a.K.) en Ŝenŝji-provinco, kolorriĉajn fragmentojn de palaca fresko pri veturilo, rajdanto, konstruaĵo kaj ornamaj desegnoj. Per tiuj freskoj oni povas imagi la luksecon kaj imponecon de la palaco de Ĉin-dinastio.

Hipogea fresko: Ofte la muroj de hipogeoj de imperiestroj kaj korteganoj estis ornamitaj per buntaj freskoj por elmontri la dignon kaj rangon de la mortinto.

En la hipogeo de geedzoj Bu Ĉjanĉiŭ de la Okcidenta Han-dinastio (206 a.K. — 22 p.K.) en Lŭojang la fresko prezentas


la ĉieliron de la mortintoj. La mastrino sur fenikso kaj la mastro kun pafarko sur drako, akompanate de feoj kaj feinoj, ekskursas sur la ĉielo plena de buntaj nuboj. La strekoj de la fresko estas variaj en tuĉado kaj riĉaj je esprimo.

La fresko en hipogeo de la Orienta Han-dinastio en Helinger de la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio prezentas la karieron de la mortinto kaj ankaŭ bienon, oficejon, antaŭpalacan turon, grenejon, plugadon, ĉevalpaŝtadon, distradon k.a. La fresko bildigas la vivon de nordaj nacimalplimultoj. La amplekso spegulita de la fresko estas unike vasta inter la hipogejaj freskoj de Han-dinastio.

La fresko en la hipogeo de aristokrato Luŝ Ŝuj de la Norda Ĉji-dinastio (550-577) en Tajjŭan de Ŝanŝji-provinco estas unu el la gravaj novaj eltrovoj de la ĉina belarta arkeologio. La fresko montris la vivon de aristokrato per alta pentra tekniko kaj arta nivelo.

La freskoj en la hipogeoj de kronprincoj de Tang-dinastio (618-907) estas grandaj kaj enhavoriĉaj. La freskoj pri akcepto de delegitoj kaj pri ceremonia gvardio vidigas amikajn interrilatojn de Tang-dinastio kun la najboroj. La fresko "Poloo" priskribas la persodevenan sporton ŝatatan de aristokratoj de Tang-dinastio. Tiuj delikataj

Kaverna fresko el la 4-a — 5-a jc.



freskoj konvinke montris la prosperon de Tang-dinastio.

Kaverna fresko: Por memkulturi kaj okazigi religiajn ritojn, budhistoj fosis kavernojn sur montoj, skulptis kaj gravuris ene budhojn aŭ faris freskojn.

La plej famaj kavernaj freskoj de Ĉinio troviĝas en Mogaŭ-kavernaro en Dunhŭang de Gansu-provinco. La kavernaro sidas sur la orienta parto de la Silka Vojo. En la kvara jarcento dum la regperiodo de Ĉin-regno bonzo Jŭe Zun fosis la unuan kavernon ĉe la piedo de la monto Sanŭej en Dunhŭang. Kaj en Tang-dinastio estis jam pli ol mil kavernoj. Ĝis nun konserviĝis 496 kavernoj el diversaj dinastioj, kaj la totala areo de freskoj superis 45 000 kvadratajn metrojn. Tiuj freskoj prezentas budhismajn rakontojn, muzikil-

ludadon, flugantajn feinojn, mecenatojn por kaverno-fosado kaj diversajn desegnojn.

En la 254-a kaverno de Mogaŭ estas fresko el la Norda Ŭej-dinastio (386-534) pri sinofero de princo Sattva. La solpeca fresko priskribas, kiel la princo oferis sin al malsataj tigroj. La esprimmaniero estis kuraĝa kaj transpaŝis la limojn de tempo kaj spaco. Kun malhela bruno kiel la bazo, la aŭtoro aldonis la bluverdan kaj grizetan kolorojn, tiel la atmosfero montriĝis solena kaj prema kaj plifortiĝis la arta infekto. Alia fresko "Ŝanĝiĝo de Okcidenta Sukavato" montras budhon sidantan sur lotusa soklo kaj ĉirkaŭajn bodisatvojn, arhatojn, diajn generalojn kaj aktorojn antaŭ ili. La fresko impresas per superbeco kaj variemo.


Freskoj troviĝas ankaŭ en kavernoj ĉe Majĝji-monto en Gansu-provinco. En la 4-a kaverno, super la fronta niĉo de la antaŭa portiko, estas fluganta feino prezentita per freska bareliefo. Tio fortigis la artan esprimkapablon.

Templa fresko: Preskaŭ en ĉiuj temploj de Ĉinio troviĝas freskoj kun religiaj temoj. Freskoj en tiu kategorio ĝenerale estas grandaj kaj delikate faritaj, la strekoj de la figuroj fortaj kaj la koloroj riĉaj. La freskoj heredis la tradician teknikon de pentrado de homfiguroj de Tang- kaj Song-dinastioj kaj havas kompare altan artan nivelon.

En la templo Jongle en Ŭujĉeng de Ŝanŝji-provinco, ĉina taoisma sanktejo, preskaŭ ĉiuj muroj de la haloj estas kovritaj per freskoj sendifektaj. El ili

Templa fresko (parto) de Ĉing-dinastio (1644 — 1911 p.K.)





Templa fresko (parto) de Jüan-dinastio (1206 —1368 p.K.)

la plej fama estas. "Kulto al la Sanktulo" en la halo Sanĉing. La fresko prezentas pli ol 280 diojn de taoismo en 4-5 vicoj. La strekoj de la figuroj estas fortaj kaj fluaj, kaj 2-3-metraĵaj strekoj por vestofaldoj estis unu-tire plenumitaj. La koloro estas ĉefe bluverda, la konturoj klaraj kaj la plenigado kolorpeza. La fresko estas majstraĵo en la historio de la ĉina pikturo. Sur la freskoj en la posta halo de Pilutemplo estas cent dioj. La freskoj de 130 kvadrataj metroj dividiĝis en kelkajn grupojn kaj ĉiu grupo havas titolon, kiu helpas kompreni la freskon. La templo Fahaj en la antaŭurbo de Pekino estis konstruita en 1439 en Ming-dinastio. Kortegaj pentristoj partoprenis en la farado de la freskoj, kio dotis ilin per alta nivelo. La tri bodisatvoĵoj sur la fresko en la posta halo surhavas diafanajn vestojn kun fortaj strekoj. La fresko estas majstraĵo de Ming-dinastio

La antikvaj ĉinaj freskoj estas konsistiga parto de la ĉina antikva piktura historio kaj valora arta heredaĵo. Tiuj delikataj

freskoj spegulis en certa grado la facetojn de la politiko, ekonomio, milita afero kaj kulturo de la diversaj historiaj periodoj de Ĉinio kaj havas gravan historian valoron.

Prosperas ankaŭ la modernaj freskoj de Ĉinio. En la lastaj jaroj ĉinaj freskistoj faris ĉ. 1 000 freskojn por modernaj konstruaĵoj kaj placoj en diversaj lokoj de la lando. Heredinte la ĉinan freskan tradicion, ili asimilis la bonan sperton de eksterlandaj freskoj kaj alprenis tradiciajn metodojn, ekzemple tradicia delikata pentrado kaj peza kolorigado, orumado kaj uzo de kolora mozaiko, akrila farbo, lako, lana teksaĵo k.a. Ankaŭ iliaj temoj fariĝis pli kaj pli diversaj, kiel historia okazaĵo, antikva mito, pitoreskejo kaj moderna vivo.

La fresko "Neĝa Kirlas Maron" en la halo de la Pekina Flughaveno portas naciajn karakterizaĵojn de Ĉinio. Ĝi pri-skribas heroan knabon, kiu batalas kontraŭ maljustaĵoj. La aŭtoro alprenis la tradician metodon de delikata pentrado

kaj peza kolorigado kaj asimilis la arton de popola novjara bildo kaj papertondaĵoj. La koloroj estas okulfrape freŝaj kaj la figuro krude ĉarma. Alia fresko "Printempo de Scienco" sur porcelana plato asimilis la okcidentan pikturon. Ĝi esprimis laŭdon al la progreso de la moderna scienco kaj aspiron al la bela estonteco de la patrolando. En la Pekina Sporthalo estas fresko "Poloo de Tang-dinastio" farita per akrila farbo. Ĝi montras la intensan konkurson de poloo en Tang-dinastio. La sceno estas viveca kaj dekoracia. Murtapiŝo kun la kopiita bildo estas konservata de la Olimpika Komitato de UN. La fresko "Fenikso en Fajro" en la Muzeo de Ĝingĝou en Hubej-provinco bildigas la reviviĝon de bunta fenikso en arda fajro. La aŭtoro aplikis la tradician uzon de lako. La koloroj estas densaj kaj belaj kaj la verko portas romantikan guston. En la hotelo "Cigno" en Harbin estas lana murtapiŝo prezentanta vintran ĉasadon de ĉina nacimalplimulto. Kaj la formo kaj la koloro de la tapiŝo harmonie kunfandiĝas kun la dekoracio de la hotelo.

Aperis inter la modernaj freskoj grandaj verkoj, ekz. la fresko "Sur la Silka Vojo" en la subtera palaco ĉe Dajapagodo en Ŝji'an longas 120 metrojn kaj altas 1.5 metrojn. Per mil personoj en la 91 poeziaj scenoj de Ekskurso ĉe Ĉjuĝjang, predikado de Ŝjüanzang, Tranoktado sur stepo, Ĉasado en Gobio, Dancado kaj kantado de Ĉiŭci kaj Bazaro de la Okcidenta Regiono, la fresko reaperigis la vidaĵon sur la Silka Vojo en la prospera periodo de Tang-dinastio. La plastiko de homfiguroj kaj elekto de koloroj impresas la rigardantojn per kreivo. □

Antikvaj ĉinaj freskoj

Ni prezentas antikvajn freskojn de Ĉinio en ĉi numero kaj modernajn en la venonta numero.



Kaverna fresko (parto) de Tang-dinastio (618 — 907 p.K.)



Templa fresko de Ming-dinastio (1368-1644 p.K.)



Hipogea fresko (parto) de Tang-dinastio (618 — 907 p.K.)



Templa fresko de Jüan-dinastio (1206-1368 p.K.)

Templa fresko de Song-dinastio (960 — 1279 p.K.)





Templa fresko de Ĝin-dinastio (1115-1234 p.K.)

BOKSO EN

ĈINIO

Reviviĝis inter la miliardo da ĉinoj bokso malaperinta en Ĉinio antaŭ 27 jaroj. Antaŭ nelonge en Nankino, urbo en orienta Ĉinio, okazis la plej grandskala konkurso en la boksa historio de Ĉinio. 12 junaj boksistoj gajnis ĉampionecon de la 12 kategorioj.

FRUJAJ BOKSISTOJ

Bokso enkondukiĝis en Ĉinion en la lastaj jaroj de la 19-a jc. Bokso, kiel sporto saniga kaj memdefenda, havas iajn trajtojn similajn al tiuj de la ĉina luk tarto *uŝu*, pro kio ĝi estis ŝatata de multaj ĉinoj jam en la fruaj jaroj post sia enkondukiĝo. Komence de la kuranta jarcento bokso disvolviĝis certagrade en la ĉemaraj sudorientaj urboj de Ĉinio.

Ĝeng Ĝjiĉang estis la plej fama boksisto en la frua periodo. En 1929, la 18-jara Ĝeng Ĝjiĉang abrupte kaj rapide knokaŭtis la rivalon per maldekstra rekta bato en la matĉo kontraŭ juna japana boksisto vizitanta Ĉinion.


En la sekvanta jaro Ĝeng Ĝjiĉang venkis en Ŝanhajo ĉampionon de pezkategorio 54 de la brita mararmeo, kio ege mirigis la rigardantojn.

En la 40-aj jaroj Ĝoŭ Ŝibin disĉiplo de Ĝeng, fariĝis eminenta ĉina boksisto kaj estis honorita kiel "Boksa Reĝo de Ŝanhajo". En 1946, en la konkurso de Ŝanhajo partoprenita de

ĉinaj, usonaj, sovetuniaj, italaj kaj aliaj trilandaj boksistoj, la 24-jara Ĝoŭ Ŝibin venkis ĉiujn siajn rivalojn kaj fariĝis la unua ĉino, kiu gajnis ĉampionecon en la internacia boksa konkurso.

Nova boksista teamo en trejnado





Lukto en la Tutlanda Amikec-pokala Boks konkurso en Nankino



Trejnisto en gvido

AKRA DISPUTO

Boksado eble estas sportobranĉo, plej malglate evoluinta en Ĉinio. En la 50-aj jaroj la akra disputo pri "por kaj kontraŭ la bokso" kondukis la sporton al

dufoja leviĝo kaj malleviĝo en daŭro de 10 jaroj.

La disputo pri la bokso fakte estis malnova problemo, t.e. ĉu ĝi estas utila sporto aŭ ne. La oponentoj opiniis, ke bokso estas

barbara, kruela kaj havas nenian econ de sporto, dum la aprobandoj insistas, ke bokso same kiel la aliaj sportoj estas ne nur saniga, sed ankaŭ utila por kulturaj kuraĝecon kaj spritecon, kaj ke ĝin ne povas anstataŭi aliaj sportoj.

En la 80-aj jaroj, ĉinaj sportistoj atingis senprecedencajn sukcesojn en la virina flugpilko, gimnastiko, plongo, halterlevo de pezkategorio 60, pafado k.a. kaj gajnis novan renomon en la internaciaj konkursoj. Kaj la sportaj aferoj estis multe atentataj de la socio, en iuj lokoj ankaŭ bokso senbrue reviviĝis. En 1985 okazis 5 lokaj invitaj turniroj, kaj samtempe pli kaj pli aŭdiĝis la voĉo por restarigi bokson.

Marte de 1986, konsiderinte, ke pli kaj pli elvolviĝis boksado en pluraj lokoj de nia lando, la konkursaj kaj juĝaj reguloj de la monda amatora boksado fariĝis pli rigoraj kaj precizaj kaj perfektigis la kuracista kontrolo, la Fizikkultura kaj Sporta Komisiono de Ĉinio decidis restarigi boksadon neglektitan dum 27 jaroj en Ĉinio.

NOVA GENERACIO

En la lokoj, kie restariĝis boksado, la trejnistoj plejparte estis boksistoj de la 50-aj jaroj.

Ŭang Ŝouŝin kvarfoje gajnis ĉampionecon de la pezkategorio 60 en la 4 tutlandaj konkursoj okazintaj en la 50-aj jaroj. Nun li estas boksa profesoro de la Pekina Sporta Instituto. Ĝou Ŝibin, "Boksa Reĝo de Ŝanhajo" en la 40-aj jaroj, estas boksa profesoro de la Ŝanhaja Sporta Instituto.

Maje, ĉi-jare, en Nankino okazis boks-konkurso partoprenita de plej multaj sportistoj en la

ĉina boksa historio. Ĉiuj provincoj kaj municipoj restarigitaj bokson sendis sian teamon. Sendis al la konkurso sian teamon ankaŭ la 5 sportaj institutoj kaj armita polica armeo de Ĉinio. En la konkurso partoprenis sume 161 boksistoj de 21 teamoj. La konkurso inkluzivis ĉiujn 12 pezkategoriojn de 49 kg. ĝis 91 kg. kiel en la internacia amatora boksado. Post 9-tagaj intensaj matĉoj naskiĝis 12 ĉampionoj de la ĉina amatora boksado.

Kvankam nemalmultaj el la junaj boksistoj havis regulan trejnadon mallongtempan, tamen ili profunde impresis la rigardantojn.

Ju Deŝun, ĉampiono de la pezkategorio 57, estas unu el la boksistoj admirataj de la sportaj amatoroj. Li estas el Ĉingdaŭ, marborda urbo de orienta Ĉinio kaj lernanto de Ŭang Ŝouŝin, profesoro de la Pekina Sporta Instituto.

Ju estas bona en la korpaj kondiĉoj. Li, obstina kaj movrapida, progresis rapide dank' al rigora trejnado de profesoro Ŭang Ŝouŝin. Li gajnis la unuan lokon en loka invita turniro okazinta en januaro ĉijare. En ĉi-foja landskala konkurso li estis teknike pli matura kaj rigardata kiel unu el la plej promesplenaj boksistoj.

Profesoro Anwar Chowdry, prezidanto de la Internacia Amatora Boksista Asocio (IABA), rigardinte la matĉon de Hŭang Gŭangĝi, kiu gajnis la trian lokon en la pezkategorio 57, diris: "Li estas sportisto, kiu povas rivali kontraŭ la eminentaj boksistoj de Azio." Li opiniis, ke post 2 aŭ 3 jaroj ĉinaj boksistoj fariĝos plej eminentaj sportistoj de iuj pezkategorioj en Azio.

KONFORME AL SCIENCOTAJ KAJ NORMOJ

Kiam la Fizikkultura kaj Sporta Komisiono de Ĉinio decidis oficiale restarigi boksadon, ĝi emfazis, ke la celo de la amatora boksado estas akceli la homan sanon fizikan kaj spiritan kaj pro tio en la boksado oni devas doni apartan atenton al la sciencaj trejnado kaj kuracista kontrolo kaj normoj en la matĉo.

La landskala konkurso en majo spegulis la penadon de la ĉinaj boksistoj ĉi-flanke. La konkurso rigore observis matĉajn regulojn, juĝajn regulojn kaj kuracistan kontrolon ellaboritajn de IABA. Antaŭ la konkurso oni faris zorgeman korpan ekzamenon, pro kiu al 7 sportistoj estis malpermesite partopreni la konkurson. Inter ili estis unu boksisto, kies vidkapablo estis nur 0.1, kiu ne konformas al la normo 0.7 de IABA.

Ĉinio ricevis en la laboro por denove disvolvi boksadon multan helpon de IABA. IABA funkciigis du trejnajn kursojn por altigi nivelon de ĉinaj juĝistoj.

Joŝida Keo, estro de la Kuracist-kontrola Komisiono de IABA, speciale venis al Nankino antaŭ la konkurso por gvidi la kuracist-kontrolan kurson.

Kvankam nun en la socio estas iuj, kiuj maltrankvilas pri la sekureco en boksado, tamen pli kaj pli da homoj aprobas tiun sportobranĉon. De la lasta jaro, kiam oficiale restariĝis boksado, pli kaj pli da ĉinoj en diversaj lokoj partoprenis la trejnadon, iuj postlaboraj sportaj lernejoj sin preparas por starigi boksan kurson, celante popularigi koncernajn sciojn inter la boksoamantaj knaboj kaj doni al ili ĝustan konon pri la boksado. □

KORESPONDI DEZIRAS

* Mi estas lernantino (16-j.), vol. kor. tutmonde pri ĉiuj temoj kaj interesiĝas pri arkeologio kaj kulturo. Adr.: Kamila Belzek, 86-100 Swiecie n./w ul. Okrezna 16, Pollando.

* Studento 21-j. dez. kor. tm. pri ĉ.t. Pawel Sikorski, ul. Kierzkowskiego 14, 62-560 SKULSK, Pollando.

* Mi dez. kor. tm. Esperante pri diversaj temoj. Adr.: Galamaga Sorin, Rîndunenelelor, BL-5jsc-cjap-15, Ludus-4350-MURES, Rumanio.

* Ŝakludantoj el E-klubo Stonava deziras korespondi kun la samhobiuloj. Adr.: Antonin WROBEL, Stonava 858, 735 34 Ĉeĥoslovakio.

* Deziras interŝanĝi monbiletojn senvalorajn aŭ malmultekostajn. Povas pagi ankaŭ per libroj, pk aŭ pm. Odeni Barbosa, Calxa Postal 794, BR-89800, Chapecó-SC, Brazilo.

* 18-j. fraŭlo vol. kor. kun samideanoj el tuta mondo kaj kolektas bk. pm. broŝurojn kaj mone-rojn. Adr.: Marian Luczywo, ul. Ratuszowa 16/6, 41-506 Chorzów 6, Pollando.

* Sekretariino 24-j. dez. kor. pri muziko, vojaĝo. Adr.: Viera Škodovová, Škultétyho 1923, 075 01 Trebišov, Ĉeĥoslovakio.

* 12-jara Lukasz Uniejewski dez. kor. kun eksterlandanoj pri ĉiuj temoj. Adr.: ul. Opolska 8/26, 44-335 Jastrzebie Zdroj, Pollando

* Mi serĉas ĉinajn poŝtmarkojn ĝis la fino de 1971 kaj ĉinajn kolorajn bk pri arkitekturo ĉinstila. Mi donos interŝanĝe polajn kaj okcidentajn pm. Adr.: Czestaw Stykowski, PK-90, 67-400 Wscho-wa, Pollando.

Akupunkturo kaj kaŭterizo servu al pli da suferantoj

— Pri la Pekina Internacia Akupunktura kaj Kaŭteriza Trejna Centro

Akupunkturo kaj kaŭterizo, tradiciaj kuracmetodoj de la ĉina medicino, estis dum longa tempo misteraj kaj malfacile kompreneblaj por alilandanoj. Kaj nun multaj el ili petas kuraccon de ĉinaj akupunkturistoj, kaj pli kaj pli multaj venas al Ĉinio por lerni akupunkturon kaj kaŭterizon.

Petite de la Monda Higiena Organizo, la Akademio de Ĉina Medicino de Ĉinio fondis la Pekinan Internacian Akupunktur- kaj Kaŭterizan Trejnan Centron, kaj tiu centro okazigis ekde 1975 34 kursojn por pli ol

700 kuracistoj el pli ol 80 landoj kaj regionoj.

Akupunkturo kaj kaŭterizo estas grava konsistiga parto de la ĉina medicino. Por ke fremdlandaj kuracistoj ellernu en mallonga tempo akupunkturon kaj kaŭterizon, la centro invitis por la kursoj 6 famajn kuracistojn kaj profesorojn kaj 9 interpretistojn, dum la kursanoj estis kuracistoj diplomitaj de medicinaj institutoj de diversaj landoj, kiuj estis mempagaj aŭ senditaj de la Monda Higiena Organizo. Nun la centro funkciigas fundamentan kaj progresigan kursojn.

Ĉiujare oni funkciigas du fundamentajn kursojn, unu de aprilo ĝis julio, kaj la alia de aŭgusto ĝis novembro. La ĉefaj lecionoj estas tiuj pri la fundamenta teorio de la ĉina medicino, akupunkturo, kaŭterizo, *ĝinglŭo* kaj ofte uzataj akupunkturaj punktoj. Krome oni donas fakajn prelegojn pro orel-akupunktura kaj masaĝa kuraco kaj akupunktura anestezado. Post trimonata lernado la kursanoj povas akiri ĝeneralan konon pri la teorio de la ĉina medicino, fundamente posedi la teorion de akupunkturo kaj kaŭterizo, la minimumajn manipolajn teknikojn kaj kuraci

Kursano en klinika praktiko



Instru-materialoj por trejna kurso




25 ofte renkonteblajn malsanojn per pikado kaj kaŭterizado sur 120 ofte uzataj akupunkturaj punktoj.

Oni funkciigas unu progresigan kurson ĉiujare, de januaro ĝis aprilo. La ĉefaj lecionoj estas tiuj pri langa diagnozo, pulsa diagnozo, dialektika analizo pri visceraj malsanoj, apliko de specifaj punktoj de akupunkturo. Post lernado la kursanoj povas kompare komplete koni la fundamentan teorion de la ĉina medicino kaj *ĝinglŭo*, memstare kuraci 40 ofte renkonteblajn malsanojn kaj iujn malfacile kuraceblajn malsanojn per pikado sur 250 akupunkturaj punktoj. Iuj diplomitoj de la fundamenta kurso daŭrigos sian lernadon en progresiga kurso, kaj plejparto revenis patrolanden por praktiki.

La centro faras instruadon kunligante klasĉambran lecionodonadon kun klinika praktikado. Ĉiusemajne ses antaŭtagmezoj estas disponataj por klinika praktikado, kaj kvin posttagmezoj por klasĉambra lecionodonado. La klinika praktikado estas plenumata en pluraj grandaj hospitaloj.

En la ambulatorio de la Esplora Instituto de Akupunkturo kaj Kaŭterizo mi renkontis kelkajn belgojn, kiuj akupunkturis por ĉinaj pacientoj sub direktado de instruistoj. Ili tenis sin seriozaj kaj estis lertaj en lokalizo de akupunkturaj punktoj, pingloenigo kaj pingloturnado. Ili multe progresis kompare kun la unuaj tagoj. Iuj suferantoj tiam timis, ke fremdlandaj praktikantaj kuracistoj akupunkturas por ili, ĉar iuj eŭropaj kuracistoj enpikis per forto pli granda ol tiu de ĉinaj akupunkturistoj.

La kursanoj de la centro ha-



Instruistino de trejna kurso faras demonstradon.

vas gajan tempon post lecionoj. En dimanĉo la centro aranĝas por kursanoj ekskursojn al pitoreskaj kaj antikvaj vidindejoj, aŭ varieteon kaj koncerton. Ĉe la komenco de ĉi jaro, grupo da kursanoj atingis Pekinon koincide kun la ĉina tradicia Printrampa Festo. Instruistoj kaj ofiĉistoj de la trejna centro pretiĝis por la kursanoj ĉinajn tradiciajn manĝaĵojn *ĝjaŭzi* kaj multajn pladojn por ke la kursanoj havu kune kun la ĉinoj gajan feston.

Estis informite, ke la diplomitoj de la centro kompetentas esti malsuperaj akupunkturistoj sankciitaj de la koncernaj ŝtatoj. Iuj el la kursanoj montris elstaran talenton. Tion ekzemplas egipta kuracisto Gogol. Diplomite en 1975, li daŭre studis kaj senĉese leviĝis lia nivelo en kuracado. Samtempe li vojaĝis tra la lando kaj inter pluraj Mez-Orientaj landoj por popularigi kaj disvastigi terapion de akupunkturo kaj kaŭterizo. Nun li estas vicprezidanto de la prepara komitato de la Monda Akupunktura-Kaŭteriza Federacio. Rumana kuracisto Baquer akiris certan sukceson en spura esplorado pri *ĝinglŭo* per moder-

naj medicinaj ekipaĵoj.


En la dekelkaj jaroj la Pekina Internacia Akupunktura kaj Kaŭteriza Trejna Centro faris utilajn laborojn por disvastigi al la mondo la akupunkturon kaj kaŭterizon de la ĉina medicino. Precipe en la lastaj jaroj, pro la malfacileco en kuraco de promedikamentaj malsanoj kaj diversaj enigmaj kaj malfacile kuraceblaj malsanoj, multaj landoj turnis sin al la naturaj medikamentoj kaj senmedikamentaj terapioj. Do ĉina medicino kaj ĝiaj medikamentoj estas multe esperataj. Registaroj kaj popolaj organizoj de multaj landoj senĉese petis Ĉinion sendi al ili ĉinmedicinajn fakulojn por prelego, kuraco kaj akademia kolokvo. Samtempe kun altigo de sia trejna povo, la centro sendis eksterlanden kompetentajn fakulojn de akupunkturo kaj kaŭterizo por gvidi kursojn aŭ prelegi, kaj tiuj senditoj trejniĝis por Ĉilio, Hindio kaj Filipinoj 40 kuracistojn kaj instruistojn de akupunkturo kaj kaŭterizo. Tia internacia kunlaboro kaj interŝanĝo akcelis la amikecon kaj ankaŭ evoluigis la scienccon de la ĉina medicino kaj ĝia farmacio. □

LA TOTALA NACIA PRODUKTOVALORO DE ĈINIO OKUPAS LA 8-AN LOKON EN LA MONDO

Post kiam Ĉinio komencis praktiki la pordomalferman politikon en 1978, la ĉina ekonomio paŝo post paŝo sin liberigis de la rutino de "alta akumulo, malalta konsumo kaj malalta efiko" kaj eniris la plej bonan periodon de la ekonomia disvolvigo post la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko.

Nun la totala nacia produktovaloro de Ĉinio okupas la 8-an lokon en la mondo, i.a. la agrikultura produktovaloro okupas la unuan lokon en la mondo kaj la industria la 5-an lokon. La valoro de ĝiaj eksportaĵoj okupas la 15-an lokon en la mondo kaj tiu antaŭ 8 jaroj la 28-an lokon.

Ĉina scienc-esplora satelito lanĉita



ĈINIO REPRENIS NOV TIPAN SATELITON

Je la 13-a horo de la 17-a, septembro, en difinita loko de la centra Siĉŭan-provinco, Ĉinio, sukcese reprenis novtipan sateliton por scienca esploro kaj teknika eksperimento.

La sateliton lanĉis la Satelitolanĉa Centro de Ĝiŭĉjŭan, Gansu-provinco, la 9-an de septembro, per la transporta raketo Ĉangĝeng n-ro 2. La funkcio de la satelito pliboniĝis kaj ĝia transport-povo altiĝis. La satelito rivoluis laŭplane 8 tagojn en difinita orbito kaj faris sciencan esploron. La Ĉina Akademio de Sciencoj veturigis per la satelito 34 scienc-eksperimentajn aparatojn.

RIĈA RIKOLTO ESPEREBLA EN ĈINIO

Riĉa rikolto estos esperebla en la ĉina agrikulturo ĉijare malgraŭ diversaj naturaj plagoj. La totala produktokvanto de greno kaj oledonaj produktaĵoj iom pligrandiĝos surbaze de la pliprodukto en la pasinta jaro. La produktokvanto de kotono malkreskis en la pasintaj du sinsekvaj jaroj, sed ĉijare ĝi kreskos kaj superos tiun de la lasta jaro. La produktokvanto de fruktoj, videble, multe pligrandiĝos surbaze de la jama kreskado en la pasintaj jaroj. Videble kreskos ankaŭ la produktokvanto de teo, silko, tabako, legomoj k.a.

La supraj informoj estas liveritaj de la agrikultura departemento de Ĉinio.

500 MILIONOJ DA KAMPARANOJ UZAS ELEKTRON

Laŭ statistiko de koncerna departemento, la jara elektra kvanto konsumita de la ĉinaj guberni-

urboj, urbetoj kaj vilaĝoj atingis 133 miliardojn da kWh, kiuj konsistigas trionon de tiu konsumita de la tuta Ĉinio. 99% de la gubernioj, 89% de la subdistriktoj kaj 70.2% de la kamparanaj familioj nun uzas elektron.

ĈIELSKRAPANTOJ DE ĈINIO

Nun en Ĉinio staras ĉielskrapantoj, pli ol 100 metrojn altaj. Ili vidiĝas en Pekino, Ŝanhajo, Kantono, Nankino, Ŝenjang kaj Ŝenĝen. Aliaj 20 ĉielskrapantoj pli ol 100 metrojn altaj nun estas konstruataj, inter kiuj la plej alta estos la Ĝuangdong-a Internacia Domego kun alto de 195 metroj.

LA PLAGITOJ DE TANGŜAN TRANSLOĜIGOS EN NOVAJN DOMOJN

La tertremo, kiu okazis en Tangŝan la 28-an de julio, 1976, komplete ruinigis la urbon kun 1.06 milionoj da loĝantoj. Post la tertremo oni konstruis domojn kun plankareo de 11.45 milionoj da kvadrataj metroj. Antaŭ la fino de 1987 ĉiuj plagitoj de Tangŝan povos transloĝiĝi en novajn domojn.

NOVA TERITORIO APEROS ĈE LA ENFLUEJO DE JANGZI-RIVERO

La esplora grupo pri la enfluejo de Jangzi-rivero, gvidata de fakuloj pri river-enfluejo kaj marbordo, konstatis, ke ĉiujare Jangzi-rivero portas de sia supra parto al la enfluejo pli ol 400 milionojn da tunoj da sablo. Pro la translokiĝo kaj sedimentiĝo de sablo aperis sub la akvo de la enfluejo delto kun areo de ĉ. 10 000

kvadrataj kilometroj. Satelita foto montris, ke la subakva delto senĉese etendiĝas al la maro. La eltrovo estas grava por ekspluati kaj utiligi la subakvajn riĉfontojn ĉe la enfluejo kaj por la urba konstruado kaj ekonomia disvolviĝo de Sanhajo.

LA BUDHISMA SEMINARIO FONDITA

La unua supera budhisma seminario de Ĉinio — la Ĉina Tibetlingva Supera Budhisma Seminario oficiale fondiĝis en Pekino kaj okazis ĝia inaŭguro por la unuaj studentoj.

La 42 vivaj budhoj el Tibeto, Gansu, Ĉinghaj kaj la Interna Mongolio sisteme studos la historion de tibeta budhismo, la etikedon kaj kriterion de budhismo kaj tibetan lingvon. La studa tempo estas unu jaro. Sed estonte en la seminario la vivaj budhoj lernos du jarojn.



La inaŭguro de la Ĉina Tibetlingva Supera Budhisma Seminario



Ujgura kantistino en konkurso

MARHIRUNDO-POKALA KONKURSO DE KAMPARANAJ KANTISTOJ

Antaŭ nelonge en Pekino okazis la marhirundo-pokala konkurso de kamparanaj kantistoj unuafoje post la naskiĝo de la nova Ĉinio.

46 elektitaj el 3 557 kantistoj partoprenis en la kvalifika konkurso kaj finalo. Tiuj kamparanaj kantistoj venis el 21 provincoj municipoj kaj aŭtonomaj regionoj de Ĉinio. Membroj de la juĝkomitato opiniis, ke la 46 kantistoj estas altnivelaj kaj iuj el ili eĉ povas rivali kun profesiaj kantistoj. La konkurso certe kontribuos al prospero de la kultura vivo de la kamparo.

ŬANG MENG HONORITA PER SPECIALA PREMIO DE LA INTERNACIA LITERATURO DE MONDELLO

La 11-an de septembro, Ŭang Meng, fama verkisto kaj poeto de Ĉinio kaj ĝia kultura ministro, estis honorita en Italio per la 13-a speciala premio en 1987 de la In-

ternacia Literaturo de Mondello. Tio estas la dua literatura premio ricevita de ĉina verkisto post Bakin, kiu ricevis la premion de Danto.

Estas informite, ke du romanoj de Ŭang Meng estos tradukitaj en la italan lingvon.

LA FONDUSO DE LA 11-A AZIA SPORTKUNVENO FONDITA

La 15-an de septembro oficiale fondiĝis en Pekino la Fonduso de la 11-a Azia Sportkunveno. Fama ĉina entreprenisto kaj prezidanto de la Internacia Kredita kaj Investa Korporacio de Ĉinio Ĵong Jiĵen funkcias kiel ĝia prezidanto.

La fonduso estas popola organizo. La donacaĵoj de diversaj sociaj rondoj estos uzataj por la 11-a Azia Sportkunveno.

SPORTAJ NOVAĴOJ

Vespere de la 13-a de septembro la Ĉina Virina Flugpilka Teamo venkis la japanan per 3:0 kaj per siaj tri venkoj gajnis la ĉampionecon de la Monda Supera Virina Flugpilka Ludo en Hongkongo. La japana teamo gajnis la subĉampionecon per du venkoj kaj unu perdo. La usona teamo gajnis la trian lokon kaj la sud-korea la kvaran.

La 16-jara ĉina sportistino Ŝju Janmej per 457.60 poentoj gajnis la ĉampionecon de la 10-metra turplonĝo (A-grupo) en la 6-a Monda Konkurso de Laŭaĝa Plonĝo, kiu okazis en Hamaro, Norvegio. Sovetiaj sportistinoj gajnis la duan kaj trian lokojn per 389.80 kaj 383.50 poentoj respektive.

La 6-an de septembro okazis en Ostrava, Ĉeĥoslovakio, la 41-a

Monda Ĉampioneeca Konkurso de Halterlevo. La ĉina sportisto He Ĝŭoĉjang gajnis la ĉampionecon de etendlevo de la 52-kilogramama kategorio per levo de 147.5 kilogramoj. Iom poste, li levis 153 kilogramojn kaj rompis la mondan rekordon, kiun starigis la bulgara sportisto Neno Terzinski antaŭ 3 jaroj per levo de 152.5 kilogramoj

TAGOJ DE BELAJ VESTOJ EN PEKINO

Aŭtune ĉi-jare en Pekino okazis la aktivado "Tagoj de Belaj Vestoj".

En la tagoj oni faris serion da prezentoj de belaj vestoj en kompleto, montris imitaĵojn de antikvaj vestoj de la ĉina nacio, okazigis grandan balon kun partoprenantoj en modaj vestoj kaj prezentis programerojn pri bela vestado. La prezento de la imitaĵoj de antikvaj vestoj de la ĉina nacio montris la prahistoriajn vestojn el best-feloj kaj arbofolioj kaj vestojn portitajn en la dinastioj Tang, Song, Ming kaj Ĉing. La elegantaj juoj imite tiujn de neolitiko kaj viraj vestoj, kiajn portas terakotaj militistoj de Ĉin-dinastio, estis tute novaj por la vizitantoj.

NOVAJ ATINGOJ EN LA ĈINA TURISMO

De 1979 ĝis 1986 inkluzive, Ĉinio akceptis 7.19 milionojn da eksterlandaj turistoj kaj 81.38 milionojn da ĉinaj elmigrintoj kaj turistoj el Hongkongo kaj Aŭmen.

Nun 450 urboj de Ĉinio estas malfermitaj al turistoj, 974 hoteloj estas disponataj de la turismaj servoj kaj ĉ. 20 000 veturiloj servas al la turismo.

POR VIA SANO

Masaĝo (III)

MASAĜO ĈE LA ORELOJ

Movoj: Masaĝu per la bazaj palpkusenetoj de la dikfingroj la lokon tuj antaŭ la oreloj (de la supro de la orelo ĝis la lobo), kun la ceteraj fingroj etenditaj, kiel en la bildo 11 (unu fojo konsistas el unu iro kaj reiro). Spiru nature.

Fojoj: 10-20.

Efiko: Forigi internan varmon kaj kvietigi la doloron de triĝemina nervo kaŭzitan de tia varmo.

MASAĜO SUPRE DE LA ORELOJ

Movoj: Masaĝu supre de la oreloj per la malsupra parto de la etfingroj, kiel en la bildo 12 (unu fojo konsistas el unu iro kaj reiro). Spiru nature.

Fojoj: 10, 20, aŭ 30.

Efiko: Fortigi la vitalan energion kaj akceli la sango-cirkuladon. Preventi supreniĝon de interna varmo kaj kvietigi akutan dentdoloron kaj intermitan doloron ĉe la oretradiko.

OBLIKVA MASAGAĜO DE LA KAPO DEKSTRE KAJ MALDEKSTRE

Movoj: Oblikve masaĝu per la manplatoj la kapon dekstre kaj maldekstre supre de la oreloj, kiel en la bildo 13 (unu fojo konsistas el unu iro kaj reiro). Spiru nature.

Fojoj: 10, 20 aŭ 30.

Efiko: Mallevi sango-premon, forigi internan varmon kaj senlacigi la cerbon.

MASAĜO DE LA ORELOJ

Movoj: Masaĝu forte malantaŭen la orelojn per la manplatoj, kiel en la bildo 14 (unu fojo konsistas el unu iro kaj reiro). Spiru nature.

Fojoj: 60, 80 aŭ 100.

Efiko: Akceli la sango-cirkuladon, delikatigi la haŭton kaj preventi orel-frostiĝon. Ĉar orelo estas organo, en kiu kuniĝas la 12 ĝinglŭo de la korpo, tial la masaĝo povas vigligi la funkcion de la ĝinglŭo, altigi la rezistpovon kaj reguligi la sango-cirkuladon. La masaĝo de orel-loboj sanigas la okulojn.

STIMULO DE TIMPANAJ MEMBRANOJ

Movoj: Premu la orel-kavojn per la pintoj de la mezaj fingroj kaj samtempe la kavojn tuj post la lobo per la pintoj de la montraj fingroj. Tenu vin kvietaj, kun fermitaj okuloj. Liberigu vin de ĉiaj pensoj, kalkulu fojojn en la koro. La premado de la orel-kavoj stimulas la timpanajn membranojn kaj tiel fortigas la aŭdpovon. Faru la ekzercadon kiel en la bildo 15. Spiru nature.


Fojoj: 40, 60 aŭ 100.

Efiko: Preventi surdon kaj redukti orelvakson. □

(Daŭrigota)



11



12



13



14



15



Turistoj

Foto de HU ĜJANŬEJ

Sur strato ĉe Hŭangpu-rivero

Fotoj de CAJ MING

Movoplena strato etendiĝas en norda-suda direkto ĉe Hŭangpu-rivero oriente de la strato Nankino en Ŝanhajo. Ĉiujare ĝi allogas multajn turistojn per siaj situo, floroj kaj ombraj arboj.

En ĉiu ferio aŭ festotago turistoj venas por sin amuzi.


Antaŭtagmeze turistoj ĝuas tie magion aŭ ĉigong-on prezentatan de amatoroj, preskaŭ same bele kiel profesiaj artistoj.

La loko estas ideala por geamantoj. Tra inter arbobranĉoj videblas paro kaj paro da geamantoj.

Sur la strato ne mankas fotantoj. Iuj el ili fotas siajn kamaradojn kaj aliaj pejzaĝojn de la strato por eterna memoro.

Rigardo al la strato





Patro kaj filo

Fotado





Geamantoj





Bela prezentado

Ĉiu havas sian hobion.





*La imperiestro Hujzong
en pentrado*




Ĝaŭ Kŭangjin en la fondiĝa ceremonio

La unua vaks-homfigura ekspozicio de Ĉinio

Teksto de ĈJU ĈUNŠAN

La imperiestro Senzong



La nomita ekspozicio situas en la urbo Kajfeng de Henan-provinco, kiu estis la ĉefurbo de la Norda Song-dinastio (960-1127 p. K.) kaj tiam nomiĝis Bjanĝing. La eksponitaj vaksaj homfiguroj prezentas gravajn eventojn en politiko, ekonomio, kulturo kaj diplomatio en 167 jaroj de la Norda Song-dinastio. Tial ĝi nomiĝas Vaks-homfigura ekspozicio de Song-dinastio.

Vaks-figura skulpturo en la mondo aperis antaŭ pli ol 100 jaroj, sed en Ĉinio nur en la lastaj jaroj. Nun eksterlande vaks-homfiguroj ĝenerale estas skulptitaj unuope, sed mankas intrigohavaj grupaj homfiguroj. La ekspozicio en Kajfeng posedas 9 grupojn pri la Song-dinastia historio, interalie troviĝas vaksaj figuroj de 9 imperiestroj kaj multaj korteganoj kaj generaloj.

La vaksaj homfiguroj estis faritaj de U Ŝjaŭpaj, instruisto de la Henan-a Metiarta Lernejo, kaj lia frato U Ĵunŝeng. Konsultinte pentraĵojn kaj aliajn historiajn materialojn konservitajn en la Muzeo de la Imperiestra Palaco de Pekino, ili elektis taŭgajn modelojn en la reala vivo kaj skulptis vaksajn figurojn laŭ la proporcio de vera homo.

La artistoj prezentis karakterojn, aĝon, sintenon kaj trajtojn de la historiaj personoj per malsamaj pozoj. La grupoj da vaksaj homfiguroj, fandiĝante kun la media atmosfero, rekvizitoj, vestaĵoj kaj lerta ŝminkado, donas versimilan efekton kaj profunde impresas la vizitantojn.

La ekspozicio kun 410 kvadrataj metroj estas en la palaco Longting kaj ĝiaj aloj rekonstruitaj sur la ruino de la imperiestra palaco de la Norda Song-dinastio. En la ĉefa halo de Longting eksponiĝas la grupo el pli ol 30 homfiguroj, titolita "Ĝaŭ Kŭangjin Imperiestriĝas en la Fondiĝa Ceremonio de Song-dinastio", kaj estas la plej granda el la tieaj vaks-homfiguraj grupoj. Ĝaŭ Kŭangjin (927-976 p. K.) estis la unua imperiestro de la Norda Song-dinastio. Li subigis la separatismajn reĝimojn kaj unuigis Ĉinion. Li faris amnestion tra la lando, premiis siajn meritajn korteganojn kaj alportis al la popolo stabilan vivon. La vaksaj homfiguroj vivece reaperigis la efektivan historian scenon, ke siatempe Ĝaŭ Kŭangjin akceptas en la ceremonio gratulojn kaj vivuojn de la korteganoj kaj generaloj. La ore brila halo kun gravuritaj traboj

kaj pentritaj kolonoj estas en luksa iluminado kaj plena ĝojo. Ĝaŭ Kŭangjin sidas alte sur trono. Li estas barba, kvadravizaĝa, okulbrila kaj rideta, en dudraka robo kaj kun krono sur la kapo. Li rigardas la korteganojn, alte tenante tason kvazaŭ dirus: "Tostu por la Granda Song-dinastio!" La ambaŭflanke starantaj korteganoj kaj generaloj kun alte tenataj tasoj kvazaŭ krius: "Vivu, longe vivu!" Palaĉaj belulinoj dancas leĝere en muziko. La tuta halo estas saturita per verva atmosfero de la dinastiofondiĝa ceremonio.

Estas tre vivecaj ankaŭ la grupoj da vaksaj homfiguroj en la okcidentaj haloj. La grupo sub la titolo de "Ŭang Anŝi en Politika Reformo" tre interesas la rigardantojn. Ĝi konsistas el la figuroj de la imperiestro Ŝenzong (1048-1085), Ŭang Anŝi (1021-1086), Sima Gŭang (1019-1086), eŭnuko kaj du palacaj servistinoj. La 21-jara imperiestro, ĵus surtroniĝinte, deziris rapide elimini la politikajn rutinojn per politika reformo kaj ŝanĝi la malriĉan kaj malfortan landon. Ĝi prezentis la scenon, ke la imperiestro aranĝas aŭdiencon por la du korteganoj Ŭang Anŝi kaj Sima Gŭang kaj

Vaks-figuroj de generaloj



Vaks-figuroj de korteganoj



absorbite aŭskultas Ŭang Anŝi, kiu rakontas pri la politika reformo. Ŭang estis eminenta politikisto kaj reformisto de Ĉinio en la 11-a jarcento, li entuziasme rakontas al la imperiestro pri la novaj politikoj, por realigis multjaran deziron. La konservativa Sima Gŭang ĉiamaniere oponis kontraŭ la reformo. Aŭskultante la opiniojn pri reformo, li kun klinita kapo meditas pri kontraŭrimedoj. Kaj la imperiestro Ŝenzong, entuziasma je la reformo, firme subtenas Ŭang Anŝi en la reformo por trovi rimedojn riĉigi la landon. La tuta skulptaĵaro konsistas el "rakontado", "meditado" kaj "promocio". La pensado de la tri personoj estis delikate kaj vivece prezentita.

"Imperiestro Hujzong en Pentrado" prezentas nur la imperiestron Hujzong (1082-1135), ĝi tamen impresas la spektantojn profunde. La imperiestro estis sur trono 25 jarojn, politike nebulkapa kaj senkapabla, sed arte eminenta. Li havis altan nivelon en kaligrafio kaj pentrado, precipe en pentrado de floroj kaj birdoj. Liaj verkoj eĉ nun estas ankoraŭ raraĵoj en la ĉina arta trezorejo. La vaksa skulptaĵo montras scenon, ke la imperiestro sola faras pentradon. Li staras ĉe tablo kun peniko en la mano kaj rigardas la ĵus finitan pentraĵon "Bonaŭgura Gruo". La skulptaĵo prezentis lian altan nivelon en la arto, lian malzorgon pri la ŝtataj aferoj kaj lian stultan mienon aspirantan nur al komforta vivo. Ankaŭ la aliaj skulptaĵaj grupoj havas respektive apartajn trajtojn.

Vizito al la ekspozicio ne nur estas estetika ĝuo, sed ankaŭ riĉigas historiajn sciojn al la rigardantoj, tial ĝi estas tre alloga al la venintoj al Kajfeng. □

ABONTARIFO DE EPĈ

(Ekvalidas en la 1-a de oktobro)

Lando	Valuto	1 jaro	2 jaroj	3 jaroj
Aŭstralio	A\$	15.00	25.00	35.00
Aŭstrio	Sch	200	340	480
Belgio	BF	550	930	1300
FR Germanio	DM	30.00	50.00	70.00
Britio	£	8.00	13.60	19.00
Finnlando	Fmk	64.00	108.00	150.00
Francio	FF	90.00	150.00	210.00
Hispanio	Ptas	1200	2000	2900
Italio	Lit	18000	30600	43000
Japanio	Yen	3000	5400	7500
Jugoslavio	Din.	1500	3000	4300
Nederlando	Gld.	34.00	58.00	82.00
Nov-Zelando	NZ\$	20.00	34.00	48.00
Portugaliao	Esc	1100	1800	2600
Svisio	SF	25.00	42.00	60.00
Usono	US\$	12.00	20.00	28.00
Kanado	Can\$	14.00	23.00	33.00
Por aliaj landoj en Eŭropo:				
	£	8.00	13.60	19.00
	US\$	10.00	17.00	24.00
Por aliaj landoj en Azio, Afriko kaj Latin-Ameriko:				
	£	5.00	8.50	12.00
	US\$	6.50	11.00	16.00

RANKORO

(Novelo)

I

Ŝi estis tre bela dum sia june-
co, kvazaŭ aperinta el lunlumo
kaj matena nebulo. La karbe
nigra hararo plektita en girland-
don estis vualita per blanka
muslino pendanta ĝis la ĉarmaj
ŝultroj kovritaj kvazaŭ de nuba
maro.

La foto estis farita en ŝia
flora aĝo. Kaj nun ŝi jam aĝis
52 jarojn. Ŝi maljuniĝis kaj la
foto flaviĝis. Ja neniuj povas
haltigi la tempon!

Tempo, kiel velkaj folioj kaj
falantaj neĝflokaj, fandas la ho-
man vivon. Kio estas vivo? Ĉu
kromosomo? Ĉu DNA-proteino
aŭ evoluo de ĉelkernoj? . . .
La tempo senĉese ion rakontis
al ŝi kaj vokis ŝin; ĉu ŝi neri-
markite adiaŭos sian vi-
von? . . .

Ĉu ŝi nepre devos adiaŭi sian
vivon kuŝante en la lito, kaj ne
dum la dancado sur scenejo?
Kun tristo kaj envio ŝi rememo-
ris, ke iuj estis mortantaj sur la
scenejo ĉe la falado de la kur-
teno. Ĉu ilia adiaŭa maniero
ne estis pli facila kaj pli plezura
ol la ŝia simila al dumviva mal-
libereco?

Ŝi, nomata Jan Jun, suferis de
paraplegio. Ŝia malsupra korpo
jam mortis.

Estis mirige, ke homo havas
duonkorpon mortintan sed la
alian duonon vivan, kaj reme-



moras, ĉagreniĝas, pentas, esperas, dankas. . .

Doktorino eniris en la ĉambron.

En sia juneco Jan Jun ludis la rolon de diino en dancosolo. La flaviĝinta foto apud la kapkuseno ja estis farita dum ŝia dancado. Tiutempe ŝi legis multajn mitojn kaj legendojn pri la diino. Ŝi dancis elegante, gracie, figurigante nevideblan sed sopiratan diinon. Sed en la psiko ŝi ankoraŭ ne certiĝis, kia devas esti vera diino.

Nun vera diino aperis: Tio estis la kuracistino.

II

La kuracistino neniam montris sur sia vizaĝo konfuziĝon, teruron kaj kompreneble malamon. Ŝi ĉiam montris la misteran rideton de Monalisa. En ŝia rideto ĉiu paciento povis vidi sunlumon, esperon kaj senti, ke la cindro de la vivo eligas sparkojn kaj fariĝas flamo. Sed neniu sciis, ke ankaŭ ŝi havis sian ĉagrenon, malamon novan kaj malnovan.

Nun ŝia malamato estis la malsanulino kun paralizitaj mal-supraj membroj, kuŝanta antaŭ ŝi. La dancistino Jan Jun, malgraŭ sia ebriiga ĉarmeco en la juneco, tute ŝrumpis, la haŭto faltiĝis, la okuloj kaj la vangoj enfalis, kaj la brusto platiĝis. Pro kio do resanigi ŝin?

La malamon de la doktorino Bu Fang kontraŭ Jan Jun vekis alia foto.

Jan Jun estis dankoplena al la fervora doktorino, kiu venadis spite venton kaj pluvon. Ŝi akupunkturis kaj masaĝis la maljunulinon, kaj ĉiutage aĉetis por ŝi frandaĵojn. Kiam la maljuna servistino petis forpermeson kaj iris hejmen, Bu Fang helpis ŝin en fekado kaj urinado, kaj eĉ lavis por ŝi la malpurajn vestojn. Ĉu ŝi estis doktorino aŭ filino? Jan Jun ĝuis famon dum la tuta vivo, sed ŝi havis nek infanon nek parencon. Kiam ŝi fermos siajn okulojn, ŝi ne havos iun prizorgendan. Se tian personon ŝi havus, tiu estus neniu alia ol la doktorino, diino el la ĉielo.

Bu Fang konsciis la dankemon de sia pacientino, kion ŝi sentis ĉe ŝiaj nebulaj okuloj kaj tremantaj lipoj. Sed ju pli klare ŝi konsciis tion, des pli ardiĝis ŝia malamikeco kontraŭ ŝi. Ŝi eĉ abomenis kaj malamis sin mem. Kiel ŝi povus konsoli la patrinon, kiu rigardas ŝin de la alia mondo?

Foto, tremiga kaj animkreviga foto!

Antaŭe la manoj de Jan Jun kaj Bu Fang estis amike kaj varme interpretataj unu al la alia, samkiel la Sankta Maria karesas la anĝelojn. Sed kiam Jan Jun montris al ŝi alian foton el sub la kapkuseno, ŝia karesa mano tuj fariĝis terura ungo de diablo.

Sur la foto estis Jan Jun kaj mezaĝa viro. Tiu viro ja estis la patro de Bu Fang.

Granda doloro akompanata de larmado erupciis el la rememoro. . .

Antaŭ dek jaroj, la patrino de Bu Fang mortis en tragika nok-

to. Ŝi sola ĉeestis la morton de la patrino. La patrino diris singultante: "Fang, ne forgesu venĝi vian patrinon, morton de via patrino kaŭzis ofendo de iu virino, malbeninda virinaĉo. Ŝi estis dancistino. Foje ŝi tordis al si piedon kaj petis kuracon de via patro. La piedo estis resanigita, dum ŝi dance saltis en nian hejmon kaj alkroĉiĝis al via patro. . ."

Virinaĉo, kie estas vi, virinaĉo?

Jen ŝi, tuj antaŭ la okuloj!

III

"Kiel vi konis lin?"

"Li resanigis mian piedon. Li estis fama ostologo kaj masaĝisto. La piedoj estas gravaj por mi, kiel peniko por verkisto kaj pentristo, voĉo por kantisto kaj fingroj por pianisto."

"Vi tre dankis lin?"

"Ne nur dankis, kaj poste mi enamiĝis en lin per mia tuta koro."

"Ĉu li havis edzinon?"

"Jes, laŭdire li havis filineton en infanĝardeno."

"Ĉu vi ne opinias, ke vi profanis la konsciencon kaj la virtoton de la homo? Ĉu vi ne sentas memriproĉon?"

"Jes, en la lastaj jaroj de mia dancistina vivo mi dancis modernan dancon iniciatitan de usona dancisto. Tia danco radikale liberigis sin el la rutinoj de la klasika baletoj kaj prezentis per libere imagitaj dancmovoj la sentojn kaj vivon de la homoj. Sed rilate amon, mi agis ne kiel

en mia danco. Mi preferis esti katenita de la tradicia klasika koncepto, kaj neniam kuraĝis libere agi kaj senbridiĝi.”

“Ĉu vere vi neniam vin senbridiĝis?”

“Ne, neniam. Tamen foje estis miskompreno. Tio okazis post kiam mia maleolo estis resanigita de la doktoro, kiun mi pli kaj pli estimis kaj amis. Dum longa tempo mi ne povis danci, kvankam mi tre volis danci kiel eble plej multe. Iun tagon, en lia hejmo, mi prenis la ruĝan littukon de sur lia lito kiel mian mantelon kaj senskrupule turniĝadis ĝis kapturniĝo. Mi falis sur lian liton kaj li aliris por levi min. Ĝuste en tiu momento eniris la dommastrino. . .”

“Ĉu tio estis nur miskompreno?”

“Jes. La mastrino elpelis min. Post tio mi neniam vizitis lian domon. Nia amo estis Helena, Platona.”

“Ĉu vi volas ŝminki vian pantecon?”

“Mi aperis sur la scenejo ŝminkita, sed neniam en la vivo. Mi promesis al li: ‘Mi neniam fariĝos via edzino, nek alies edzino, kiam vi havas edzinon.’”

“Ĉu vi vere tenas vian promeson?”

“Jes, ĝis nun mi restas sola, kvankam sur scenejo mi ludis la rolon de edzinoj de pli ol cent figuroj.”

“Ĉu vi vere observas la Platonan principon, ke asketismo kaj abnegacio estas virto?”

“Ho Platono, tiam mi pensis, ke Platono ja estas la doktoro, kiu resanigis al mi la piedon kaj tenis sanktan korinklinon al mi. Mi adoris lin kiel sanktulon. Antaŭ dek jaroj forpasis lia edzino, kaj li iris labori en malproksimega loko. Mi vizitis lin, traveturinte la senliman dezerton.”

“Kiel li fartas?”

“Li estis kuŝanta sur la salalkala dezerto, debila kiel mi nun. Kun granda malfacilo li levis sin, kvazaŭ kamelo perdinta la hararon. Li petis min en tremtanta voĉo: ‘Ĉu vi dancu por mi? Tio ja estos la lasta fojo.’ Mi ekploris kaj dancis. Fininte la dancadon mi falis teren. Mi diris: ‘Ni geedziĝu!’ Li konsentis. Post kelkaj tagoj mi iris reviziti lin, sed li jam mortis, kaj mi nur vidis, ke ombro de aglo ŝvebanta en la ĉielo transflugis lian kadavron. . .”

IV

Bu Fang revenis hejmen kaj ploregis, tenante en sia sino la foton de siaj gepatroj.

De tiam ŝi daŭre iris flegi onklinon Jan Jun ĉiutage. Ŝi devis montri plej sinceran senton, por la patro kaj ankaŭ por la patrino. . . □

Esperantigis ŬANG GENCAJ

Solvoj por enigmoj:

1. telefono
2. spegulo



Poemoj de frua Tang-dinastio

de MEJ ĜI

Senprecedence prosperis la ĉina literaturo en Tang-dinastio (618-907). La eseo, romano, populara rakonta kaj kanta literaturo, poezio kaj *ci-o* (speco de poeziaĵoj diferenca de la ordinaraĵoj poemoj. Ĝi aperis en Tang-dinastio kaj prosperis en Song-dinastio) ĉiu certgrade evoluis. Inter alie, la ĉinaj antikvaj poemoj eniris en sian oran epokon.

La ĉiufanka prosperiĝo de literaturo de Tang-dinastio unue rezultis el la senprecedenca unuigo de la lando, kiu donis favorajn kondiĉojn al literatura verkado. Krome la ĉina literaturo, kiu trapasis jam longan evoluon, liveris abundajn konsultindajn heredaĵojn por sia plia disvolviĝo en la periodo de Tang-dinastio. Estis aparte menciinda la sinteno de la literaturistoj de Tang-dinastio kritike heredi kaj evoluigi novajn el la malnovaj en traktado de la literaturaj heredaĵoj. En la poezia rondo de la transira periodo, kiu inkluzivis Suj-dinastion (581-611) kaj la komencan periodon de Tang-dinastio, aperis batalo por renovigi la poezion kaj kontraŭ pimpa kaj enhavosterila poezi-stilo. Post la zigzaga kaj profunda batalo iom post iom aperis novaj ŝanĝoj en la poezia verkado kaj enhance kaj forme.

Frue en la periodo de Ĉji (479-502) kaj Ljang (502-557) de la Sudaj Dinastioj (420-589), jam aperis tendenco sole strebi al ritma simetrio kaj ĉarmaj vortoj. Tion oni nomas Ĉji-Ljang-stilo. Ĝi furoris en la poezia rondo antaŭ Tang-dinastio. La tiamaj poemoj plejparte estis verkitaj laŭ edikto kaj enhance dekadencaj kaj diboĉaj. Kvankam aperis iuj eminentaj poetoj kaj bonaj poemoj kun nova enhavo, tamen ili ne povis ŝanĝi la tutan tendencon.

En la frua Tang-dinastio daŭris Ĉji-Ljang-stilo. La verkoj de palacaj poetoj, kiaj Ŝen

Ĉjüanĉji (656-714) kaj Song Ĝiüen (656-712), ne povis sin liberigi de la influo de Ĉji-Ljang-stilo, sed ili verkis ankaŭ poemojn malsamajn ol tiuj de Ĉji-Ljang-stilo, surbaze de personaj travivaĵoj. Ili faris elstarajn kontribuojn en la poezia metriko.

Ŭang Ĝji (585-644) en la frua Tang-dinastio estis poeto kompare elstara pro sinliberigo de la malnova, palaca stilo. Li oficistiĝis en la dinastioj Suj kaj Tang. Li estis ambicia en siaj junaj jaroj, poste marasmiĝis pro nesukcesa oficista vivo kaj fine revenis hejmen por ĝui liberan vilaĝan vivon. Liaj poemoj odoras certgrade vivspiron kaj sentigis stilan freŝecon kaj senafektecon, kio estis tre kara siatempe. Tion ekzemplas lia reprezenta verko "Rigardo sur Kampoj", kiu legiĝas jene:

*Ĉe Donggaŭ mi rigardas en vespero,
Do kion mi atendas, vagabondo?
Aŭtunajn arbojn kovras flavkoloro,
Dronas en vesperruĝo foraj montoj.
Paŝtistoj hejmen bovidojn kun pelo
Venigas, kaj ĉasistoj kun la predoj.
Serĉante la konatojn per l' okuloj
Vane, mi kantas vee pri ermitoj.*

Ĝi vivece bildigis kamparan pejzaĝon kaj lian senĝenan vivon.

Post Ŭang Ĝji, aperis kvar eminentaj literaturistoj en la frua Tang-dinastio, ili estas Ŭang Bo, Jang Ĝjong, Lu Ĝaŭlin kaj Lŭo Binŭang. Ankaŭ iliaj verkoj estis profunde influataj de Ĉji-Ljang-stilo, sed dank' al ilia relative malalta pozicio en la socio, ili havis ŝancojn koni pli vastajn socitavolojn, kaj tial iliaj verkoj nature montras siajn indignon kaj malkontenton unuflanke kaj aktivan, progreseman spiriton aliflanke. Tio havigis al iliaj verkoj vastan kaj pro-

fundan penson kaj sekve alportis al la tiutempa poezia rondo freŝan spiron.

Ŭang Bo (649-676) estis malalta en la socia pozicio. Li dronis en maro je sia aĝo de 27 jaroj. Inter la kvar eminentaj literaturistoj Ŭang Bo estis la plej fama. Lia artikolo "Pri la Pavilono de la Princo Teng" estas vaste cirkulanta. Laŭdire, iun fojon, kiam Ŭang Bo revenis al sia hejmo por viziti la patron, survoje li estis en Hongĝoŭ (la nuna Nanĉang de Ĝjangŝji-provinco), ĝuste kiam finkonstruiĝis la Pavilono de la Princo Teng kaj pro tio la prefekto aranĝis feston, al kiu ankaŭ Ŭang Bo estis invitita. Dum la festeno la prefekto volus, ke lia bofilo verku ion kaj pavu antaŭ la ĉeestantoj. Tial neniu kuraĝis provi sian plumon, kvankam la mastro petis ĉiun gaston al verkado. Ŭang Bo ne konis lian intencon kaj akceptis la peton. De kolero la prefekto forlasis la feston kaj ordonis subulon transdiri al li la verkon de Ŭang frazon post frazo. Kiam la subulo transdiris al li la frazojn:

*La vesperruĝo ŝvebas kune kun
sovaĝansero,*

*Koloras same l' akvo de aŭtuno
kaj l' ĉielo.*

La prefekto ŝanĝis sian koleron en ĝojon, admirante: "Vera geniulo!" Tio estas la fama artikolo "Pri la Pavilono de la Princo Teng", de tio Ŭang Bo famiĝis tra la lando.

Liaj nemultaj poemoj nun trovitaj montras, ke li havis sian originalan stilon en la poetiko. Tion ekzemplis lia fama "Adiaŭ al Vicprefekto Du Forironta al Ŝu". El ĝi estas versoj:

Amikoj bonaj trans montar' kaj maroj

Sin sentas ĉiam kiel ja najbaroj.

La versoj metas flanken la adiaŭan ĉagrenon kaj prezentas lian neordinaran aspiron. Lia alia poemo "Ĉe Monto" prezentas liajn triston kaj nostalgion per nur 20 ideogramoj.

Jang Ĝjong (650-693) el la kvar eminentaj literaturistoj verkis plej malmulte kaj sekve lia sukceso estis malgranda. Kelkaj liaj poemoj pri militista vivo ĉe landlimo estas bonaj. Ni prenu kiel ekzemplon la poemon "Armeaniĝo":

*Al la ĉefurb' alarmo urĝe venis,
Agitis forte mian koron kvietan.
Marŝalo lasis la imperian kortegon,
Sieĝis ni l' kastelon malamikan.
Nebulis militflagoj de neĝado,
Kaj muĝis norda vento kaj tamburo.
Grupestron bravan mi ŝatas
Pli ol klerulo nenion farantan*

Ĝi prezentas bravan aspiron de multaj kleruloj pri la militista vivo ĉe landlimo.

Lu Ĝaŭlin (ĉ. 635-ĉ. 689) estis lerta en verkado de sep-ideogramaj versaĵoj. "Antikva Ĉang'an" estas lia reprezenta verko. En tiu longa poemo li prezentis la monduman vivon de la ĉefurbo Ĉang'an per pimpaj versoj. Li priskribis viglan trafikon, pompajn domojn, arbitron de generaloj kaj korteganoj favorataj de imperiestro, kaj fine montris, ke ĉia prospera, diboĉa, degenera kaj freneza vivo estos nur ventaĵo. El liaj poemoj legiĝas versoj:

*La luksa vivo estas efemera,
Ŝanĝiĝas ĉio palpebrume.
Forestas la pasintaj domoj luksaj,
Vidiĝas tombejo kun pinoj verdaj.*

KONKURSO DE EPC-AMIKOJ

Por akceli amikecon kaj interkomprenon kaj por ke ĉiuj zorgu pri la disvolviĝo de nia movado, ni decidis okazigi decembre de 1988 konkurson de EPC-amikoj. Ni invitas niajn legantojn al tiu konkurso.

Tiuj, kiuj bone legos EPC de 1988, sukcesos en la konkurso. Ni aperigos la

konkursajn temojn kaj regulojn en la lasta numero de EPC 1988, kiun ni petas vin atente legi.

Ni premios la unuajn kvar elstarajn per ĉin-stila murtapiŝo, la duaĵn ok per ĉina silka brokato kaj la triajn 30 per Esperanta libro kaj donacos memoraĵon al ĉiuj aliaj partoprenantoj.

La Red.

Ili montras la malŝaton de la poeto kontraŭ la riĉeco kaj luksa vivo. Ĝiaj lastaj versoj

*Fama Jang Ŝjong vivis solece,
Verkis ĉiam en malriĉo, deprimate.
Liaj verkoj odoras osmante,
Ĝuigas legantojn agrable.*

priskribas la solean vivon de la poeto en Ĉang'an kaj liajn intereson kaj aspiron.

Lŭo Bin'ŭang (640-?) estis saĝa de sia infaneco kaj komencis verki poemon en la sepjara aĝo. Li estis ekzekutita pro partopreno en aktivado kontraŭ la imperiestra patrino U Zetjan (624-705). La de li verkita artikolo "Denunco kontraŭ U Ĝaŭ" estas tre fama. (U Ĝaŭ estis alia nomo de U Zetjan.) Same kiel Lu Ĝaŭlin, ankaŭ Lŭo Bin'ŭang estis lerta en verkado de *geŝing*-stilaj poemoj (speco de antikvaj poemoj kanteblaj). Lia fama poemo "Pri la Imperiestra Ĉefurbo" estas enhance simila al "Antikva Ĉang'an" de Lu Ĝaŭlin, sed pli longa kun pli multaj belaj vortoj kaj estis laŭdita kiel senprecedenca siatempe. Li lerte priskribis la prosperon de ĉefurbo, pompajn domojn kaj orgian vivon de nobeloj kaj esprimis sian malkontenton kaj indignon.

Lia poemo de kvin-ideogramaj versoj "Kanto de Malliberulo pri Cikado" estas arte pli matura. Li komparis sin kun cikado kaj esprimis per ĝi sian triston, ke li estas riĉa, sed ne povas akiri alies konfidon kaj ke li ne povas alten flugi pro persekutado de perversa forto. La poemo montras lian triston kaj indignon per komparo kaj vere estas eminenta, lakona verko el la poemoj en la komenca periodo de Tang-dinastio.

Ĉen Zi'ang (661-702) estis alia fama poeto en tiu periodo. Li firme oponis kontraŭ la dekadencia Ĉji-Ljang-stilo, konscie iniciatis poezian reformon kaj faris pioniran laboron en starigo de nova poezia stilo. Li estis senĝena, liberala kaj helpema en sia juna aĝo. Lian talenton admiris la regantino U Zetjan, sekve li akiris ŝtatan oficon. Li dufoje aliĝis al armeo, unufoje en la aĝo de 26 kaj duafoje en la aĝo de 36 jaroj. 38-jara, li rezignis la oficon kaj revenis al sia hejmloko. Fine li estis persekutita de malbonulo kaj mortis en prizono, kiam li estis 42-jara.

Ĉen Zi'ang estis poeto, kiu klare montris sian kreivan, renovigan spiriton en la teorio kaj praktiko. Li akre kritikis Ĉji-Ljang-stilon, dirante, ke ĝi estas "plena de pimpaj vortoj, sed sen

komparoj". Li montris, ke la brila tradicio de "poezia komparo" kaj "traĵtoj de Han kaj Ŭej" devas esti modelo en la poezia verkado kaj ke oni devas realigi veran renovigon de poezia enhavo sub la standardo de restaŭro. Lia "komparo" signifas disvolvon de la tradicio kritiki la realon, ke la poemoj havu klaran politikan tendencojn. Liaj "traĵtoj" postulas, ke la poemoj havu noblan penson kaj ardan senton. Liaj asertoj forte kritikis la malnovan dekadencan stilon kaj malfermis la vojon por la burĝonanta poezia stilo.

Nun legeblas pli ol 120 poemoj de Ĉen Zi'ang. Liaj poemoj, precipe 38 poemoj "Pensoj", klare prezentas lian renovigan penson. Ilia riĉa enhavo vidigas lian kontraŭdiran kaj komplikan penson. La poemoj ironias pri la realo, kritikis aktualaĵojn aŭ rakontas liajn malkontenton kaj idealon. Precipe menciindaj estas la poemoj pri reala militista vivo ĉe landlimo. La versaĵoj

*Matene Jungong mi venas,
Rigardojn norden mi ŝetas.
Proksimaj tuĝjŭe kaj ĉinoj estas,
Senlimaj dezertoj majestas.
La malamikoj arogantaj, ferocaj,
Entrudiĝas foj-foje svarmantaj.
Ĉe ni generaloj ja mankas kapablaj,
Fariĝis la altaj kasteloj feblaj.
Pri la gardo malforta profunde ĝemante,
Popolanoj baraktas sangante.*

montras lian profundan indignon al la sentaŭgaj generaloj garnizonantaj landlime, ke ilia malvenko kaŭzis senĉesan suferon al la popolanoj. Lia fama poemo "Ascendo al Jouĝou-altano" prezentas lian patoson pro disreviĝo de la nobla idealo, rememorante antikvulojn kaj kritikante la realon.

*La antikvuloj jam ne plu nin gvidas,
Kaj novajn daŭrigantojn mi ne vidas.
Pensante pri l' senfina universo,
Kun tristaj larmoj sola mi malridas.*

Ĝi, kvankam mallonga, havas profundan signifon.

Iuj poemoj de Ĉen Zi'ang ja estas pasivaj, tamen neniom influite de Ĉji-Ljang-stilo. Tio estas admirinda. Lia poezia teorio pri renovigo kaj lia poezia praktiko havis tre profundan influon sur la poezian renovigon de Tang-dinastio. □

* *Tuĝjŭe estis nacimalplimulto loĝanta norde de Ĉinio en Tang-dinastio.*

Kvar poemoj el frua Tang-dinastio

ŬANG BO:

Adiaŭ al vicprefekto Du forironta al Ŝu

*De la ĉefurb' kun vasta ter-dekoro,
Rigardas mi nebulan Ŝu en foro.*



*Adiaŭsento regas nin je l' horo —
nin, ofte migrajn pro la ŝtatlaboro.
Amikoj bonaj, trans montar' kaj maroj
Sin sentas ĉiam kiel ja najbaroj.
Je la disiĝo ni ne verŝu larmojn,
Samkiel homoj el la buduaroj.*

LŬO BINŬANG:

Kanto de malliberulo pri cikado

*Aŭtune laŭtas jen cikadario,
Karcere min turmentas nostalgio.
Paradas al blankhara maljunulo
La kanto de l' insekt' kun emocio.
Pro peza roso flugo malfacilus
Kaj kantan sonon forta vent' disŝirus.
Neniu kredas, ke nobleco estas,
Do kiu por mi koran vorton dirus?*

ĈEN ZI'ANG:

Printempa orkideo kaj polli' somera

Printempa orkideo kaj polli, somera
Smeraldoverde verdas en kreskad' prospera,
Unike ĉarmas ili kun purpuraj tigoj
Kaj ruĝaj floroj sure — rara belo tera.
Iom post iom mallongiĝas tago nia,
Aŭtuna vento venas per paŝad' gracia.
La velkaj floroj falas per la ventoblovo,
Ja kie restas plue la arom' ilia!*

Rigardo al Ĉu-lando trans Ĝingmen

*Al Uŝja-gorĝo fora laŭ mezuro
Rigardas mi de Ĝangtaj en veturo.
Finiĝis montoj de la lando Baŝu,
Apertas Ĝingmen+ meze de nebulo.
Jen urbo staras en kampar' parade
Kaj l' nubojn tranĉas arboj senkomplete.
Mi, viro kun fiero en la koro,
Alvenas al Ĉu-lando nesciate.*



Trad. LAŬLUM

* Pollio (*Pollia japonica*) — florphanto simila al zingibro kun floretoj milde bonodoraj.

+ Ĝingmen estas monto kun aperto simila al pordo ĉe la piedo.

Liŭ Ŝjaŭĉing -- filma stelulino de Ĉinio



Liŭ Ŝjaŭĉing

Ŝi estas brila stelulino, aperinta el inter la revigliĝantaj filmaj rondoj de Ĉinio. Sendube ŝi havas amasegon da adorantoj inter la rigardantoj en- kaj eksterlandaj.

Ŝi estas ofte ĉirkaŭita de freŝaj floroj kaj fluoreskaj lampoj kaj ricevas leterojn de filmmaniuloj. En Ŝanhajo, Kantono kaj aliaj urbegoj la filmmaniuloj ĉiam bonvenigas ŝin per plej solena ceremonio...

En sia pli-ol-dek-jara aktorina vivo ŝi jam kreis ĉ. 20 figurojn de ĉinaj virinoj malsamaĝaj, malsamprofesiaj kaj malsamkarakteraj. La roloj luditaj de ŝi estas klaraj en la karaktero, sinceraj en la sento, tiel ke formiĝis ŝiaj originalaj trajtoj — “senbrideco, kuraĝeco kaj pikeco”. Ŝi ludis ankaŭ rolojn de teneraj virinoj. Ŝi ofte postlasis freŝan impreson al la rigardantoj. Kompreneble ŝi spertis sukcesojn kaj ankaŭ malsukcesojn. Ĉio ĉi registris ŝian lukton en ĝojo kaj malĝojo.

“RESTIGU ŜIN!”

Liŭ Ŝjaŭĉing neniam opinias sin belulino. Ŝiaj sukcesoj estis rikoltitaj ĉefe ne dank’ al ŝia aspekto, sed dank’ al ŝia aŭdaca strebado kaj kreado kaj al ŝia talento.

Ŝia vivvojo ne estis glata. En la infaneco ŝi suferis de nutromanko. Ŝi estis turmentita de ftizo. Ŝi estis bruna kaj malgrasa kun la hararo flaveta kaj maldensa. Ŝia patrino tondis al ŝi la harojn, tiel ke ŝi aspektis kiel kalvulo. En la aĝo de 11 jaroj ŝi sukcesis en la enira ekzameno al la mezlernejo sub la Siĉŭan-a Konservatorio. Diplomiĝinte, ŝi foriris al la kamparo kaj fariĝis kamparanino. Dank’ al sia talento de kantado, dancado kaj muzikil-ludado, ŝi estis akceptita de iu gubernia ensemblo kaj poste de iu teatra trupo de la urbo Ĉengdu.

De tiam la tagoj pasis milde kaj malrapide kiel rivereto.

Iutage filmstudio invitis ŝin

fari provan ludadon kaj nur tiam ŝi eksentis novan ŝanĝiĝon en la vivo.

Ŝi sukcesis! Ŝi trapasis la provon.

Ŝia unua filmo estis “La Granda Muro sur la Suda Ĉina Maro”, kiu spegulas la vivon de milicanoj defendantaj la sudorientan marbordon de Ĉinio. La Dolĉa Knabino ludita de ŝi ne estas heroino de la filmo, nek sukcesa ekrana figuro. Juĝate laŭ la filmista vidpunkto ŝiaj troigitaj movoj evidentiĝis en la filmo, tamen Liŭ Ŝjaŭĉing, debutinta surekrane, finis krei sian unuan figuron de filmo.

Poste ŝi ludis en la filmo “Dankon al Vi, Kamarado” kaj aliaj tri filmoj, bedaŭrinde, neniu el ili estis sukcese filmita.

En la aktorina kariero de Liŭ Ŝjaŭĉing la filmo “Ŝjaŭhŭa” havas apartan signifon por ŝi.

Dank’ al “Ŝjaŭhŭa” ŝi ricevis la premion de la plej bona neĉefa

rolulino en la 3-a Filmfestivalo "Cent Floroj" de Ĉinio.

"Ŝjaŭhŭa" estas rakonta filmo pri la ĉina liberiga milito. Liŭ Ŝjaŭĉing ludis He Cujgu, la estri- non de gerila taĉmento. Sceno el la filmo priskribas, kiel He Cujgu portas vunditan soldaton per brankardo. Ŝi, kunpremite la dentojn, genue surgrimpis ŝtupon post ŝtupo la monto- supron.

Por sukcesigi la filmon, Liŭ Ŝjaŭĉing preskaŭ ĉiutage sur- grimpadis genue ŝtuparon. Ŝi persistis en la ekzercado eĉ kun la genuoj ŝvelintaj.

Dank' al ŝia zorgema prepara- do la scenc estis prezentita ver- simile kaj kortuŝe.

Ŭang Jang, la estro de la Pekina Filmstudio, rigardinte tiun filmon, ekkriis de ĝojo: "Restigu ŝin!"

Plenuminte la filmon "Ŝjaŭ- hŭa", Liŭ Ŝjaŭĉing fariĝis memfida. Ŝi opinias, ke la karak- tero de ĉiu aktoro devas havi tri punktojn: vivsperto; kultura klereco; imitpovo, komprenemo kaj kreivo. Ĉion ĉi ŝi jam pose- das.

Ŝi do volis provludi negativan rolon en la vivo.

En la filmo "Tia Estas la Familio" ŝi ludis la rolon de Ĝang Lan.

Ĝang Lan estas vendistino maldiligenta, senzorgema, or- namema kaj leĝera. Evidente, estis malfacile por Liŭ Ŝjaŭĉing ludi tian rolon. En la filmado ŝi ne dediĉis ĉefan atenton al la eks- tera aspekto, sed al prezentado de la interna mondo, tial ŝia leĝera kaj senbrideta rido aŭdi- ĝas ĉe la oreloj de rigardantoj kaj ŝiaj ĉarmaj kaj erotogenaj

vestoj ŝvebas antaŭ iliaj okuloj ...

"KAMPO" — MEJLOŜTONO POR ŜI

En ŝia aktorina kariero kaj por la de ŝi kreitaj figuroj la filmo "Kampo" estas mejloŝtono.

La filmo "Kampo" estas adaptaĵo de reĝisoro Ling Zifeng laŭ la fama dramo de la ĉina dramisto Caŭ Ju. Ĝi rakontas, kio okazis en vilaĝo de nordori- enta Ĉinio en la 20-aj jaroj: La juna kamparano Ĉiŭ Hu, mal- juste kondamnita de kanajlo Ĝjaŭ al mallibereco, forkuris el la malliberejo al la hejmo kaj informiĝis, ke la kanajlo Ĝjaŭ, kiu mortigis liajn patron kaj fratinon, jam mortis kaj Hŭa Ĝinzi, la fianĉino de Ĉiŭ, jam estis la edzino de Daŝing, filo de Ĝjaŭ. La amo de Ĉiŭ kaj Ĝinzi neniom malfortiĝis kaj ili fariĝis denove geamantoj. Ĉiŭ Hu kun venĝ-flamo mortigis Daŝing. Persekutate de policianoj Ĉiŭ Hu helpis Ĝinzi fuĝi el la danĝero kaj sin mortigis. En la filmo Hŭa Ĝinzi estis ribelema virino, kiu malkontentis pri la feŭda familia kateno kaj aspiris al amo kaj libero.

Liŭ Ŝjaŭĉing tre ŝatas Hŭa Ĝinzi, heroinon de la filmo. Le- ginte la scenaron, Liŭ neniel povis sin deteni de ekscitiĝo. Ĉiufoje, kiam Liŭ fermis siajn okulojn, ŝi kvazaŭ vidis, ke la vigla Hŭa Ĝinzi staras antaŭ ŝi. Ŝi dediĉis plej grandan entuzias- mon al ludado de tiu rolo.

"Neniu rolo tiel interesis min, kiel Hŭa Ĝinzi. Fininte la film- ludon mi eĉ sentis melanko- lion," rememorante la filmadon, Liŭ diris kun profunda sento.

La kreiva laboro de la teatra trupo de "Kampo" rikoltis riĉajn fruktojn. Ĝia projekciado faris

Liŭ Ŝjaŭĉing ludas la rolon de Hu Jujin, la mastrino de lunĉejo.





Liŭ Ŝjaŭĉing ludas la rolon de la imperiestra patrino Ciŝji en la filmo "Reĝado malantaŭ la Kurteno".

sensacion en la lando. Hongkongo, Usono, Kanado kaj Italio aĉetis kopiojn de la filmo. En la filma festivalo en Venecio la filmo "Kampo" gajnis la honoron de "rekomendita plej bona filmo en la mondo".

La vesto de Ĝinzi estas metita en la Franca Muzeo. Ĝi, kiel

atingo de la ĉinaj filmoj, eksponiĝos tie por ĉiam.

"LA URBETO FUĴONG" KAJ ALIAJ

"La Urbeto FuĴong" estas alia filmo sensacianta ĉe la ĉinaj filmaj rondoj post la filmo "Kampo". Per kelkaj fojoj da leviĝo kaj malleviĝo de la

heroino Hu Jujin kaj ŝia trifoja amo, la filmo elvolvas la intrigojn, spegulas la politikan situacion, socialan ŝanĝiĝon, homajn travivaĵojn kaj ŝtatajn prosperon kaj malfeliĉon de la komenco de la 60-aj jaroj ĝis la fino de la 70-aj jaroj.

En la filmo Liŭ Ŝjaŭĉing ludis la heroinon Hu Jujin kaj akiris grandan sukceson, kio markis alian kulminon en ŝia prezenta arto. En la filmo Liŭ modere prezentis Hu Jujin, kio ravis la rigardantojn. La mezaĝa Hu Jujin unue perdis sian edzon kaj tuj poste estis maljuste kondamnita. Hu baraktis en la duobla malfeliĉo kaj fine rekonsciigis, kaj ĉe ŝi vekigis la amo al la heroo Ĉin Ŝutjan. Foje, la mano de Ĉin estis hazarde metita sur ŝian ŝultron, Liŭ per vizaĝa mieno perfekte prezentis ŝian kompleksan animstaton, ke ŝi kun timo ne volis forpuŝi la manon, kio plene rivelis la konservativan kaj aspiran animstaton de Hu Jujin.

Nun Liŭ Ŝjaŭĉing pretas filmi la novan filmon "Ĉina Artilerio" kunlabore kun sia edzo reĝisoro Ĉen Ĝuoĝjun. En tiu rakonta filmo Liŭ ludos mildan virinon — soldatinon Ju Ŝu. La fama ĉina klasika romano "Songĝo en Ruĝa Buduaro" adaptiĝos al ekrano kun la sama titolo, en kiu Liŭ Ŝjaŭĉing ludos gravan rolon de Ŭang Ŝjifeng.

Liŭ Ŝjaŭĉing, stelulino spertinta sukcesojn kaj malsukcesojn, estas memfida al sia estonteco. En la simpozio pri la prezentarto de Liŭ Ŝjaŭĉing, okazinta en Ŝanhajo, 1986, ŝi malkaŝe diris, ke ŝi deziras, ke la ĉinaj filmoj estu projekciataj en la tuta mondo, kaj esperas, ke ŝi mem fariĝos la unua ĉina filmaktorino, kiu gajnos internacian premion. □

Trapiki balonon per kudrilo

(Magio)

Ludo: La ludanto montras al la rigardantoj balonon pufigitan per aero. Ĝi estas ordinara ludilo-balono. Poste li trapikas la malsupron de la balono per kudrilo kun dika fadeno kaj eltiras la kudrilon el la supro, lasante la fadenon en la balono. La balono ne krevas nek malŝveliĝas. Nun la ludanto ŝetas la balonon alten en la aero kaj denove trapikas ĝin per la kudrilo, tiam la balono tuj krevas.

Artifiko: Kial la balono ne krevas je la unuafoja trapiko?

La kaŭzo kuŝas en tio, ke la supro kaj malsupro de la pufigita balono estas multe pli dikaj ol ĝia mezo. La pli dikaj ekstremoj kun granda dilateblo povas firme fiksi la traŝintajn kudrilon kaj fadenon. Tial la balono ne povas krevi kaj la aero en ĝi ne povas tuj ellasiĝi. Poste la ludanto trapikas iun lokon meze de la balono, ĝi tuj krevas pro manko de dilateblo en la meza parto.

Flugipova flamo

(Fizika eksperimento)

Ludmaniero: Metu vitroplaton sur tablon kaj iom altigu ĝian unu flankon per objekto. Poste metu mallongan kandelon sur la malaltan flankon de la vitroplato kaj kotonbulon kun unu mililitro da benzino sur ĝian altan flankon, kiu distancas de la kandelo je 10-15 cm. Post kiam oni bruligas la kandelon, la flamo mem flugas al la kotonbulo. Kovru la flamon per glaso kaj demetu ĝin tuj post la estingiĝo de la

kotonbulo, la flamo reflugas donove al ĝi.

Kaŭzo: Benzino estas volatiliĝema, kaj ĝia volatilaĵo brulema, tial la kotonbulo kun benzino estas bruligita de la brulanta kandelo. Post kiam la flamo estingiĝas kovrite de la glaso, la glaso ene estas plena de benzina volatilaĵo. Kiam oni demetas la glason, la volatilaĵo denove ekbrulas.

Peco da sapo

(Humuraĵo)

Iu turisto demandis al sia ĉiĉeronino: "Vi multe helpis min en mia vojaĝo. Mi volas donaci ion al vi. Kion vi plej ŝatas?"

La ĉiĉeronino estas avara. Ŝi respondis balbute: "Mi ŝatas min beligi... Nu, donu al mi tion, kio estas uzata por la oreloj, fingroj aŭ kolo."


En la sekvanta tago la turisto donis al ŝi donace pecon da sapo.

Subskribo

(Humuraĵo)

Verkisto A pasigis jam sian (Solvoj troveblaj en ĉi numero)

Severa patro, aĝabla avo (Karikaturato)



oran tempon de verkado kaj malĝojis pro manko de taŭgaj materialoj por verkado. Tiam venis al li homoj unu post alia por peti de li helpon. Sekve li komencis sian "helpan" laboron. La vorto "helpa" estas uzata kun citiloj pro tio, ke la helpo kondiĉas komunan subskribon sub la verko de ĉiu petanto.

Iu junulo venis al li kun peto, ke li poluru por li artikoleon. Kiel kutime, A prezentis sian kondiĉon. Aŭdinte tion, la junulo sentis sin ĝenata. Rimarkinte tion, A demandis, kia artikoleto ĝi estas. La junulo respondis, ke ĝi ne estas pli ol anonco pri edziĝpeto.

Enigmoj

1. Io senkapa havas orelojn kaj buŝon. Oni parolas pere de la buŝo, kaj aŭdas parolon el loko sufiĉe fora pere de la orelo.

(Objekto)

2. Kvankam ĝi estas maldika plato, tamen ĉio troviĝas en ĝi. Se vi ne kredas, rigardu, ankaŭ vi troviĝas en la plato.

(Ĉiutaga uzaĵo)

Kunfluejo de tri riveroj

de DA ŬEJ

Minĝjang-rivero, la plej granda branĉo de la supra parto de Jangzi-rivero, fluas tra la akvobaraĵo Duĝjangjan kaj poste suden pli ol 100 kilometrojn por kunflui kun la okcidentaj branĉoj Ĉingji kaj Dadu. Ĉe la kunfluejo sidas la antikva urbo Leŝan kun areo de 20 000 kvadrataj kilometroj kaj 6 200 000 loĝantoj. En la lastaj jaroj ĝi jam fariĝis prospera turisma urbo.

EMEJ-MONTO KAJ LA GIGANTA BUDHOSTATUO

Leŝan estas turisma urbo abunda je originalaj turismaj vidindaĵoj.


Emej-monto kaj la Giganta Budhostatuo de Leŝan estas fame konataj tra Ĉinio.

Emej-monto situas okcidente de la kunfluejo. Rigardate de malproksime, ĝi aspektas kiel longa kaj bela virina brovo. Ĝia ĉefa pinto altas je 3 099 metroj super la marnivelo. Pro milda klimato kaj abunda pluvo la monto ĉiam estas verde vestita. Tie estas multaj raraj bestoj kaj plantoj. La monto estas admirata kiel la plej bela loko sub la ĉielo. Ankaŭ ĝi estas sanktejo de la ĉina budhismo. Laŭdire, sur la monto estis pli ol 150 temploj, kiuj plejparte ruiniĝis. Nun kelkaj estas rekonstruitaj.

Mi surŝipiĝis kaj post dekelkaj minutoj atingis la piedon de Lingjun-monto ĉe la kunfluejo. La Giganta Budhostatuo 71 metrojn alta estas ĉizita sur la kruta roko tuj ĉe la rivero. Rigardate de malproksime, la Giganta Budhostatuo kun afabla mieno impresas kiel monto, kaj la monto — statuo. Tiel la Giganta Budhostatuo kun simetria staturo kaj konvena proporcio prezentas tre altan skulpturon. Sur la statuo estas drensistemo por forkonduki montakvon kaj malfortigi naturan erozion.

La budhostatuo de Leŝan estas konstruigita de bonzo Hajtong de Tang-dinastio (618-907 p. K.). Trovinte, ke ŝipoj tie veturantaj ofte dronis en la rapida fluo ĉe la kunfluejo, li volis skulpti budhan statuon por subigi la katastrofon kaj patroni ŝipan navigacion. Oni dediĉis 90 jarojn al la konstruado de la statuo kaj fine plenumis ĝin. Dum la pasintaj pli ol mil jaroj, kvankam ĝi ne ludis la patronan rolon, tamen montris saĝon kaj iniciatemon de la antikvaj ĉinaj laborantoj, kiuj estas respektataj de la posteuloj.

La kaverna tombo Mahaŭja okcidente de Lingjun-monto estas alia fama antikvaĵo de Leŝan. Kaverna tombo, distingiĝa




sepulta formo, estas borita sur monta rokmuro, kio populariĝis en Siĉŭan-provinco en la periodo de la Orienta Han-dinastio (25-220 p. K.) ĝis la Sudaj kaj Nordaj Dinastioj (420-589 p. K.). La tombo Mahaŭja estis la plej pompa el la pli ol 10 000 kavernaj tomboj malkovritaj en Leŝan. Mi kun klinita kapo eniris la tombon kaj trovis, ke ĝia enirejo estas malalta, tamen la interno larĝa. Ĝi estas 30 metrojn profunda, ĝi larĝas iuloke pli ol 10 metrojn kaj altas ĉ. 3 metrojn. La pordo kaj muroj de la tombo surhavas multajn gravuritajn legendajn homfigurojn, objektojn, birdojn kaj bestojn, kiuj vivece spegulas la tiamajn socian vivon, kulturon kaj arton. En la tombo eksponiĝas diversaj argilaj homfiguroj, ĉerko, ceramikaĵoj k. a.

Krome, en Leŝan troviĝas ankaŭ la malnova loĝejo de Gŭo Moĵŭo (1892-1978), la fama moderna eminenta erudiciulo de Ĉinio, la templo de Su Ŝjun kaj liaj du filoj, literaturistoj de la Norda Song-dinastio (960-1127), la Malgrandaj Tri Montgorĝoj de Mingĝang-rivero kaj ŝtonkaverno kun mil budhostatuoj en Ĝjaĝjang.

PROSPERAJ FOIROJ

La viglaj kaj originalaj foiroj de Leŝan estas vizitindaj por la turistoj. Tie troviĝas multaj vendobudoj kaj lunĉejoj, plejparto de ili estas entreprenata de individuoj. Iliaj mastroj starantaj ĉe strato varme invitas pasantojn al si fari aĉeton. Tie la vaporumitaj ĝjaŭzi-oj, vaporumita bovaĵo, stufita anaso kaj aliaj lokaj produktaĵoj de Leŝan estas vere bongustaj. La budoj formis longajn vicojn ĉe la gravaj vojoj kaj turismaj punktoj. Okulfrapas la alte pendantaj vestoj de diversaj fasonoj kaj abundo da ŝuoj, ĉapoj kaj ĉiutagaj



Baŭgŭo-temple en Emej-monto

bezonaĵoj kaj turismaj memoraĵoj.

Laŭdire, en 1978 tie estis maksimume 1 000 privataj entreprenoj, nun la nombro superis 73 000 kun pli ol 100 000 laborantoj. Tiu granda trupo de privata ekonomio entreprenas industrion, metion, konstruadon, riparadon, komercon, manĝaĵojn kaj aliajn servojn. Ĝi ludas pozitivan rolon en la loka ekonomio, produktado, enpostenigo de urbaj senlaboruloj kaj vilaĝaj superfluaĵoj laboruloj kaj faciligo de la popola vivo.

Ambaŭflanke de la ŝoseo ĉe la piedo de Emej-monto staras belaj duetaĝaj domoj unu apud alia. Ili estas hoteloj individue administrataj de lokaj kamparanoj. Laŭdire, iuj el ili posedas kapitalon de centmiloj da jŭanoj. Sed antaŭ kelkaj jaroj la kamparanoj en tiu ĉi loko nur povis vivteni siajn familianojn.

Ĉe la Giganta Budhostatuo mi

trovis, ke nemalmultaj lokaj gejunuloj kun fotilo okupiĝas pri fotado por turistoj. Iu junulo nomata Fang Lunju kaj lia edzino ekokupiĝis pri fotado en 1981. En turisma sezono ilia monata enspezo povas superi 1 000 jŭanojn. Oni humure diris, ke nemalmultaj riĉiĝis de la budhostatuo.

Mi vizitis ankaŭ prilaborejon de stufita anaso entreprenatan de Joŭ Delong. Kvankam en ĝi estis nur kelkaj puraj kaldronoj, tamen la de li stufitaj anasoj estas bongustaj kaj bone vendataj, li ĉiutage preparas 40-50 stufitajn anasojn kaj forvendas ilin nur en du horoj.

Inter la privataj komercistoj ja estas iuj, kiuj malobservas la leĝojn, tamen en la socio estas antaŭjuĝo pri la privataj laboruloj, fakte tiu ĉiam pli grandiganta trupo de individuaj laboruloj jam fariĝis neignorebla forto en la ekonomia konstruado de Leŝan.



Sur strato de Lešan

PROSPERO ALPORTITA DE TURISMO

En la 70-aj jaroj la industria kaj agrikultura produktado de Lešan estis postiĝinta kaj malrapide disvolviĝis. En 1978 la totala produktovalorado de industrio kaj agrikulturo estis 2.3 miliardoj da jŭanoj. Ekde tiu jaro Lešan praktikas pordmalferman politikon. En kelkaj jaroj multe ŝanĝiĝis ĝia ekonomia konstruado kaj la fizionomio de la urbo. En 1985 ĝia totala produktovalo-

ro de industrio kaj agrikulturo kreskis ĝis 4.1 miliardoj da jŭanoj, kreskis ankaŭ la meznombra enspezo de oficistoj kaj kamparanoj, kaj la ekonomio kaj la sociaj aferoj de Lešan eniris en novan stadion de disvolviĝo. En tiu ĉi jaro ĝi fariĝis urbo rekte sub la provinca registaro.

La estro de la Turisma Administrativa Buroo de Lešan konigis al mi, ke post la pordmalfermo Lešan altiris grandan nombron da turistoj en- kaj eksterlandaj

dank' al siaj ĉarmaj pejzaĝoj, raraj historiaj restaĵoj kaj originalaj moroj. Laŭ statistiko de 1979-1985 la nombro de la eksterlandaj turistoj, kiuj vizitis la lokon, kreskis de 2 000 ĉiujare al 20 000 kaj tiu de la enlandaj turistoj kreskis de 1.5 milionoj al 4.5 milionoj da homfojoj ĉiujare.

Nun la turisma servo de Lešan koncernas ne nur turismon, sed ankaŭ ĝeneralan aferon de ekonomio, scienco kaj kulturo.

Unue, la turisma afero akcelis la disvolviĝon de la terciara industrio. Multe kreskis la pasaĝera kvanto, pluroble kreskis la enspezo de tradiciaj servoj, kiaj restoracioj kaj hoteloj, pli rapide disvolviĝis precipe la servo de la distriktaj kaj urbataj entreprenoj.

Due, la turisma servo stimulis la disvolvon de la industria ekonomio de Lešan, precipe tiun de la industrioj malpeza, tekstila, metia, manĝaĵa kaj aliaj strikte ligitaj kun la turisma servo. Ilia jara produktovalorado kreskis je 15.8% meznombro ĉiujare. La prospera turisma servo altiris multajn eksterlandanojn al Lešan por entreprenado kaj investado. Komence ili investis al hoteloj kaj distraj instalaĵoj kaj poste al industrio, ekz., la produktaj ekipaĵoj de minerala akvo kaj biero de Emej-monto estis enkondukitaj el FR Germanio kaj Francio kaj la produkta linio de okcidentaj kostumoj estas konstruita per kapitalo de Japanio.

Laŭ kalkulo de iuj, se la turisma servo kreas produktan valoron de unu jŭano, do la socia enspezo estas ĉ. 10 jŭanoj. El tio oni povas vidi, kiel grandan rolon ludas turisma servo en la ekonomia konstruado de Lešan. □



Parto de Lešan

Foto de **JAN ĠIN**



En foiro

Foto de **HAI FENG**




La kunfluejo de tri riveroj


Foto de **HAI FENG**



La Giganta Budhostatuo

Foto de **JAN ĜIN**





La templo de Su Shun Kai Jia du Jiao
Foto de IAN GIN

LAIKO, VIVA BUDHO, CIVILULO



Granda halo de la templo Ŝjilituĝaŭ

La vivaj budhoj estas enkarniĝintaj dioj de la tibeta budhismo. Ili estas sanktaj en la okuloj de budhistoj kaj misteraj en tiuj de ordinaraj homoj. Kiam mi vizitis Ŝjilituĝaŭ, la plej grandan lamaisman templon en Huhhot — la ĉefurbo de la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio, mi informiĝis, ke fama viva budho akceptos min kaj rakontos al mi pri la historio de la templo. Sekve, mi intervjuis la vivan budhon en ordinara vesto kaj kun ordinara vizaĝo.

La infaneco de la viva budho havis misteran koloron. En 1943 naskiĝis bebo en Ĉjeza-vilaĝeto de tibetanoj, Gujnan-gubernio, Ĉinghaj-provinco. Liaj gepatroj donis al li ordinaran tibetanan nomon Ĉjangba. La familio de Ĉjangba estis tre malriĉa, same kiel la aliaj tibetaj paŝtistaj familioj. La gepatroj amis lin kaj timis, ke la mizera vivo lin turmentos. Kiam la malgranda Ĉjangba estis 3-jara, miraklo falis en la mizeran paŝtistan familion kaj sur Ĉjangba. Laŭ la metempsikoza sistemo de la tibeta budhismo tri famaj vivaj budhoj de la templo Deĉing en

Ĉinghaj-provinco difinis, ke Ĉjangba estas renaskita viva budho. De tiam Ĉjangba estas la 11-a viva budho de la templo Ŝjilituĝaŭ. Lia budhisma nomo estas Ĝjimateŝjijibu Zamusu.

Oni diras, ke Geĝju-sekto de la tibeta budhismo plej frue aplikis la metempsikozan sistemon de viva budho en difino de la heredanto por viva budho. Post kiam leviĝis Gelu-sekto, ĝi severe malpermesis al la bonzoj edziĝi kaj heredis la metempsikozan sistemon en difino de la templa gvidanto. Nome, post forpaso de la maljuna viva budho, la gvidantoj de la templo, pere de aŭguro kaj dio-invitado, serĉas knabetojn naskitajn en la tempo, kiam la viva budho forpasis, kaj el ili elektas unu bebon kiel la renaskitan vivan budhon kaj akceptas lin en la templon, por ke li heredu la religian gvidantecon kaj ricevu adoron de la bonzoj.

Ĉjangba fariĝis viva budho, kio ŝanĝis ne nur lian nomon, sed ankaŭ lian socian pozicion. Tiam li forlasis siajn gepatrojn kaj ankaŭ sian mizeran familion. Tio

verŝajne estis puno por naiva knabo. Eĉ nun, kiam li rememoras pri la pasinteco, li kun emocio diras: “Kiel viva budho, mi perdis amon de la gepatroj kaj parencoj kaj malĝojis en la koro.”

Aliflanke, la ŝanĝiĝo de la socia pozicio ebligis al Zamusu ricevi kompletan kaj bonan edukon en la fama lamaisma templo Tar de la provinco Ĉinghaj, kaj sekve de tio li fariĝis erudiciulo. En 1956, kiam li estis 14-jara, li venis de Tar-temple al la templo Ŝjilituĝaŭ. La bonzoj de la Interna Mongolio faris tie solenan ceremonion por Zamusu. De tiam li oficiale estas viva budho.

La sincera interparolo intimiĝis nin. Mi esprimis al li mian deziron viziti lian hejmon, li senhezite diris: “Bonvenon, mi akceptos vin kiel honoran gaston.” Tial, mi venis al lia loĝejo iuvespere. Sur la librobretoj kaj skribotabloj estis metitaj diversaj libroj. Evidente Zamusu ŝatas librojn kaj estas erudicia. Li diris, ke li ŝatas novelojn kaj romanojn, precipe



Zamusu benas lamaon.

la novelojn kaj eseojn de la ĉina moderna literaturisto Lusin. Li diris ankaŭ, ke li nun esploras pri la nacia historio kaj religia historio. Li kolektis multajn materialojn pri la mongola budhisma historio kaj intencas verki artikolojn post ordigo kaj esploro.

Vidante nemalmultajn medicinajn librojn sur liaj librobretoj, mi demandis: “Ĉu vi lernas medicinon?” “Jes.” Lia respondo mirigis min. “Ĉu la viva budho estas ankaŭ kuracisto?” La viva budho iam mem lernis medicinon kaj posedas certajn fundamentajn sciojn pri kuracado. Krome, li lernis medicinon ĉe iu fama loka kuracisto. Poste li lernis klinikajn spertojn unu jaron en la Ĉin-Mongola Hospitalo de Interna Mongolio kaj fine fariĝis taŭga kuracisto. Nun Zamusu faras kuracadon en ambulatorio de la Ĉin-medicina Instituto de Interna Mongolio antaŭtagmeze de lundo kaj merkredo. Li kuracas ankaŭ

en sia hejmo kaj la templo.

La viva budho Zamusu posedas eminentan medicinan arton. Antaŭ kelkaj jaroj iu pli-ol-60-jara virino de Pekino suferis asciton. La ventro multe ŝveliĝis, ke ŝi eĉ ne povis vidi siajn piedojn. Ŝi vizitis multajn hospitalojn en Pekino, sed ne resaniĝis. Foje, kiam ŝi veturis al Huhhot por viziti sian fratinnon, oni proponis, ke ŝi konsultu la vivan budhon Zamusu. Li prognozis la pacientinnon kaj donis al ŝi de li preparitajn ĉinajn medicinaĵojn. Post nelonge, la maljunulino resaniĝis. Ŝia ventro malgrandiĝis. La antaŭaj vestoj ne plu taŭgis al ŝi kaj ŝi devis denove pretigi al si novajn vestojn.

Zamusu neniam postulas pagon por kuracado. Kelkiam li eĉ mem elspezis monon de manĝo kaj loĝado por pacientoj, tial li estas multe respektata de la lastaj.

Kompreneble, el liaj pacientoj estas nemalmultaj budhistoj,

kiuj kredas la dian kuracon de la viva budho. Ĝuste pro tio, la kuracefiko ĝenerale estas bona, kio profundigas ilian respekton al Zamusu.

Antaŭ ol forlasi Huhhot, mi refoje venis al Ŝjilituĝaŭ. Tiam la templo faris religian aktivadon. En ĝi ŝvebis incensa fumo, oreplaĉe sonis la sonoriloj kaj tamburoj. En la tuta templo regis solena kaj sankta atmosfero. Kiam mi eniris en la ĉefan halon kun bonzoj, mi vidis Zamusu en stolo beni lamaojn. La lamaoj en vico plejparte estis maljunuloj kaj adore iris al li unu post alia. Zamusu levis sian dekstran manon kaj karesis iliajn vertojn, recitante sutron. Mia kodako fotis scenojn el lia religia aktivado.

Karesinte la lastan lamaon, Zamusu venis al mi. Li diris, ke la templo havas 14 lamaojn kaj pli ol mil laikajn budhistojn. Ili ĝenerale partoprenas en produktita laboro kaj havas fiksan enspezon. La budhistoj venas al la templo nur post laboro aŭ emeritiĝo. Ĉiujare je la 8-a kaj la 15-a de la unua monato, la 15-a de la sesa monato kaj la 24-a — 25-a de la 10-a monato laŭ la lunkalendaro, en la templo okazas granda religia aktivado. Tiam multaj budhistoj el diversaj lokoj de la aŭtonoma regiono venas al la templo por kulti budhojn. Kaj en la templo Ŝjilituĝaŭ regas granda spektaklo.

Jam pasis multaj tagoj, post kiam mi adiaŭis la vivan budhon Zamusu. Mi ofte sopiras al li. En mia memoro li estas ordinara homo, li havas siajn ĝojojn, malĝojojn, ŝaton kaj socian aktivadon, kaj iufoje li ne estas ordinara homo. Li estas viva budho en la okuloj de la religianoj! Tio ŝajne estas neimagebla, sed reala en la nuna Ĉinio. □

IU JIĈJUN:

Progresanta porplenaĝula edukado en la mondo

Kun rapida disvolviĝo de la produktado, scienco kaj tekniko de la socio, porplenaĝula edukado jam fariĝis nemankigebla konsistiga parto de la edukado de la mondo. Senprecedencaj estas ĝiaj skalo, formo, enhavo kaj metodo.

Porplenaĝula edukado en la monda eduka kampo progresas ĉefe en la jenaj flankoj:

Legaliziteco. Post la Dua Mondmilito registaroj de multaj landoj dekretis seriojn da rimedoj kaj leĝoj rilate la porplenaĝulan edukadon, kio garantiis al la porplenaĝula edukado specifan kaj gravan lokon kaj akcelis la porplenaĝulan edukadon. Ekz. iuj landoj difinis la porplenaĝulan edukadon kiel unu el la bazaj rajtoj de civitano kaj unu el la bazaj politikoj de la ŝtato; aliaj landoj difinis en la konstitucio disvolvan kurson kaj gvidan principon por la edukado de plenaĝuloj. Bulgario, Ekvadoro, Grekio, Turkio k.a. havas leĝon pri la edukado de plenaĝuloj; FR Germanio, Finnlando, Svedio, Japanio, Singapuro, Hindio k. a. ellaboris regularon por trejni plenaĝulojn. En julio 1987, konforme al la postulo de disvolvo de ekonomio kaj progresigo de scienco kaj tekniko, la ĉina registaro sankciis la "Decidon de la Ŝtata Eduka Komisiono pri Reformo kaj Disvolvo de Porplenaĝula Edukado".

Dumviva edukado. Multaj landoj metis la porplenaĝulan edukadon en la dumvivan edukadon sistemon, ĝin kompletigis

kaj disvolvis, kaj klare elmetis la problemon pri la dumviva edukado. La porplenaĝula edukado estas eduko frontanta ne nur al la certa periodo de la homa vivo, sed ankaŭ al la tuta vivo de la homo. En la 39-a Internacia Eduka Konferenco en 1984, 75 el la 83 proponoj kaj raportoj faritaj de la membrolandoj de Unesko al la konferenco aparte menciis la dumvivan edukadon de plenaĝuloj. La reprezentantoj de la membrolandoj unuanime opiniis: "De la lulilo ĝis la tombo, la homo bezonas edukadon, kaj porplenaĝula edukado estas grava parto de dumviva edukado kaj ludas ŝlosilan rolon."

Diversaj formoj de la eduko. Meze de la 70-aj jaroj malfermi altlernejojn al la socio fariĝis mondskala tendenco. Multaj landoj plene utiligas la bonajn kondiĉojn, ekipaĵojn kaj instruistaron de altlernejoj por akceli porplenaĝulan edukadon. Aperis diversaj formoj de la edukado de plenaĝuloj en la mondo. Ekz. kurta universitato en Japanio, distrikta instituto en Usono, malsupera politekniko en Francio, aperta universitato en Britio, kaj radio-televizia, koresponda, vespera universitatoj furorigintaj en multaj landoj. Cetere, iuj landoj fondis multfakan kompleksan centron kaj trejnan centron por eduki plenaĝulojn, ekz. Sovetunio kaj Jugoslavio havas laboristan universitaton kaj popolan universitaton, Francio kaj Britio disvolvan centron de socia kaj ekonomia kunla-

boro. La ĉina porplenaĝula edukado prenis kiel ĉefajn formojn la televizion, vesperan, korespondan universitatojn, kaj laboristan universitaton kaj laboristan kolezion administratajn de entreprenoj mem kaj helpatajn de eduka departemento de la registaro; kaj en la kamparo iuj lokoj havas kamparanan kolezion.

La supre menciitaj formoj en diversaj landoj liveras al plenaĝuloj lokon por ke ili plue klerigu sin en tekniko, kulturo kaj akademia esplorado, kaj ke ili sin adaptu al la disvolviĝo de la ekonomia situacio kaj progreso de la socio, senĉese renovigu sian scian strukturon kaj altigu laboran kapablon.

Modernaj metodoj. La moderna scienco kaj tekniko liveras novan teknikan bazon al la moderna eduka metodo. La porplenaĝula edukado ĉefe servas al profesiuloj lernantaj post laboro, tial estas malfacile doni klasĉambran lecionon, ĉeestatan de multaj lernantoj. La moderna scienco kaj tekniko estas plene utiligata en la porplenaĝula edukado; la rimedoj, kiel radio-disaŭdigo, televizio, videoregistrado, son-registrado, komputilo kaj sputniko, estas popularigitaj kaj disvastigataj. Praktiko pruvis, ke efektivo de modernigo de la porplenaĝula edukado rompis la limigon de tempo, spaco, profesio kaj vivkondiĉoj, plivastigis la terenon kaj ŝancon por ricevi pluan edukadon kaj akcelis la porplenaĝulan edukadon. □

Ili ne estas senkoheraj kiel sableroj

En Ĉinio la nombro de gejunuloj atingis 320 milionojn. Ili, energiplenaj, ŝatas partopreni en diversaj aktivadoj laŭ siaj gustoj en la postlaboraj horoj. La Ĉina Tutlanda Junulara Federacio estas organizo fondita laŭ la deziro kaj bezono de la gejunuloj. Ĝi havas historion de 38 jaroj.

Antaŭ nelonge mi intervjuis Li Keĉjang, vicprezidanton de la federacio. 31-jara, li estas viglapensa kaj kohera en parolado kaj bone konas la staton de gejunuloj.

Li diris, ke la Ĉina Tutlanda Junulara Federacio fakte estas la

unueca organizo kunliginta la Komunisman Junularan Ligon de Ĉinio, la Asocion de Junaj Kristanoj, la Asocion de Junaj Entreprenistoj kaj Administrantoj, kaj la Ĉinan Tutlandan Studentan Federacion. Ĝia celo estas organizi la tutlandan junularon, por ke ili ludu sian rolon sur la propraj postenoj. Laŭ la deziro de la gejunuloj prosperigi Ĉinion, la federacio partoprenigas ilin en la reformado, kuraĝigas ilin fari inventetojn kaj proponetojn; en gravaj konstruoj de la ŝtato la federacio organizas sturmtaĉmentojn de junuloj; en scienc-teknikaj rondoj la federacio subtenas nove

aperantajn junajn talentulojn; ĝi partoprenigas studentojn en ĝenerala kaj teknika konsultiĝoj al la publiko, kaj en gvidado de kulturaj kursoj; en la kamparo la federacio subtenas kaj helpas la malriĉajn, kaj kuraĝigas gejunulojn sin riĉigi la unuaj. Okaze de la junularaj festoj, ĝi faras al junuloj diversforman edukon pri revolucia tradicio, por ke ili konu la pasintecon de Ĉinio, kaj kulturu sian patriotisman entuziasmon.

La federacio aktive faras internaciajn kontaktojn. En la lastaj tri jaroj ĝi sendis 77 delegaciojn kun mil membroj al multaj landoj kaj regionoj, dume ĝi akceptis 487 alilandajn delegaciojn kun 6 000 anoj. La kontaktoj jam etendiĝas de ĝeneralaj amikecaj kontaktoj al interŝanĝo kaj kunlaboro en la ekonomia, kultura, teknikaj kaj aliaj kampoj. Inter ili estis kelkaj sukcesaj grandskalaj amikaj kontaktoj kun alilandaj gejunuloj: la amika renkontiĝo de ĉinaj gejunuloj kaj 3 000 japanaj gejunuloj en 1984, la amika renkontiĝo de 500 gejunuloj de la azipacifika regiono en 1985 por la Internacia Jaro de Junularo, kaj la amika renkontiĝo de 150 rumanaj gejunuloj kaj la ĉinaj. Observante la principon de "ĝojo, vicleco kaj varieco" la aktivadoj profundigis la interkompreniĝon kaj amikecon inter la

Japanaj amikoj vizitas la Pikturan kaj Kaligrafian Societon de Pekinaj Gejunuloj.



ĉinaj kaj alilandaj gejunuloj kaj rikoltis bonan efikon.

Sekvante la ekzemplon de la tutlanda federacio, junularaj federacioj de diversaj provincoj kaj municipoj aranĝas por gejunuloj viglajn kaj interesajn aktivadojn, kaj gajnis ties konfidon.

La kampanjo "ĉiu fariĝu bona helpanto de sia fabrikestro" kondukita de la junulara federacio de Ĝuangdong-provinco altiras al si milojn da gejunuloj. Nur en 1985 junaj laboristoj en tiu provinco faris 30 000 raciajn proponojn. Kaj en la diskuto pri administrado kun la titolo "se mi estus la urbestro", 9 000 proponoj estis elmetitaj en mallonga tempo.

La Junulara Federacio de Ŝanhajo okazigis diversformajn aktivadojn, laŭ la ŝatoj de gejunuloj, pri muzikapreco, rigardo de bildbenda filmo, vizito al librejo, ekskursoj, briĝo, danco k.a. Oni fondis muzikamantajn societojn, donas al gejunuloj kursojn de muziko, okazigas muzikan aprecadon, dank' al kio pli kaj pli multaj gejunuloj sentas sian vivon enhavoriĉa kaj poezia.

La Junulara Federacio de Pekino faris enketon al la junaj laboristoj kaj oficistoj kun la temo "kion vi ŝatas en la postlaboraj horoj?". Dank' al la enketo oni konstatis, ke la postlabora vivo de la gejunuloj hodiaŭ jam evoluas de malalta al alta nivelo. Ili aspiras al civiliza, sana kaj enhavoriĉa postlabora vivo, kaj ĉirilate ili ekhavis novajn postulojn. Surbaze de la enketo, la federacio okazigis aktivadojn, por fari la postlaboran vivon de la gejunuloj agrabla, signifoplena kaj spirite riĉa.

Konsiderante pri la maloportuna trafiko, informomanko kaj



Gejunuloj de Sanĝin-hotelo de Tajjŭan ŝatas kaligrafadon.



Kantonaj junuloj en amuza kunveno

kultura estiĝinteco de la regiono, la Junulara Federacio de la Sud-Gansu-provinca Tibeta Aŭtonoma Subprovinco organizis vizitgrupojn de junaj paŝtistoj, kiuj je sia propra elspezo vizitis Langŝou, Pekinon, Ŝanhajon, Suĝou, Uŝji kaj aliajn urbojn. La gejunuloj ne nur rigardis belajn vidindaĵojn de la patrolando kaj riĉigis sian spiritan vivon, sed

ankaŭ larĝigis sian vidkampon, vidinte atingojn de la ekonomia konstruado post vizito al alilokaj fabrikoj, minejoj kaj aliaj entreprenoj. Dum la vizito, la gejunuloj starigis kontaktojn kaj samprofesiajn interrilatojn kun iuj urboj, i.a. ili subskribis dekkelkajn kontraktojn pri kunlaboro en ekonomio kaj kulturo kun la urbo Uŝji. □

NAŬ GRANDAJ PASEJOJ EN ĈINIO

de LAN ŜAN

En antikva Ĉinio oni konstruis pasejojn ĉe gravaj trafikvojoj kaj en strategie gravaj lokoj. Ili estis gardataj de trupoj. En Ĉinio estas naŭ grandaj pasejoj. Ili estas jenaj:

Ŝanhajgŭan-pasejo, oriente de la urbo Ĉinhŭangdaŭ de Hebej-provinco, estas la orienta deirpunkto de la Granda Muro. Norde de ĝi sidas Janŝan-montaro kaj sude de ĝi kuŝas Bohajmaro, tial ĝi ricevis la nomon Ŝanhajgŭan (ĉinlingve "ŝan" signifas monton, "haj" — maron kaj "gŭan" — pasejon). En 1381 Ming-dinastio konstruis tie la Grandan Muron kaj pasejon. En la paseja urbeto estis konstruitaj kvar pordegoj, sur kiuj estas po unu turo. Ekster la urbeto estas ĉirkaŭfosajo. La oblonga teraso de la orienta pordego estas alta je 12 metroj. Sur ĝi staras grandioza turo kun tabulo surhavantanta la vortojn "La Unua Pasejo en la Mondo". En Laŭlongtoŭ ĉe la marbordo sude de Ŝanhajgŭan-pasejo sidas Ninghaj-kastelo kun perimetro de 500 metroj, interne de ĝi staras Ĉenghaj-turo. Ĉirkaŭ la paseja urbeto dislokiĝas multaj alarmaj signalturoj, kiuj formis solidan defendan sistemon kaj faris la

lokon strategie grava en la ĉina historio. Samtempe, la pasejo estas ankaŭ grava loko, kiu interligas nordan kaj nordorientan Ĉinion.

Ziĝinggŭan-pasejo, ĉe Ziĝingling-monto, 40 kilometrojn okcidente de la gubernia urbo de Jiŝjan-gubernio, Hebej-provinco, estas unu el la gravaj pasejoj de la interna Granda Muro. Frue en la Orienta Han-dinastio (25 — 220 p. K.), pro la strategia graveco oni konstruis tie Ujŭan-pasejon. Proksime de la pasejo staras krutaj rokmuroj kaj serpentas danĝeraj vojoj. La loko estas unu el la gravaj pasejoj por eniri Tajhang-montaron el Hebej-ebenaĵo. Somere, sur Ziĝingling-monto pompe floras cercisoj (*Cercis chinensis*) (ĉinlingve, Ziĝing-floro) kaj ĉie karesas ilia aromo. La cercisoj multe beligas la majestan pasejon. Tial oni donis al ĝi la alian nomon Ziĝinggŭan-pasejo. Ĝi situas inter Ĝjujunggŭan- kaj Daŭmagŭan-pasejoj. Oni nomas ilin ĉiujn Internaj Tri Pasejoj.


Ĝjujunggŭan-pasejo, nordokcidente de Ĉangping-gubernio de Pekino kaj pli ol 50 kilometrojn for de la urbo, estis grava pasejo

de la Granda Muro. Ambaŭflanke de ĝi ondiĝas verde vestitaj montoj. Inter la montoj zigzagas valo, kiu longas je 20 kilometroj kaj kutime nomiĝas la Paseja Valo. La loko estas strategie kaj trafike grava en la nordokcidenta Pekino. Interne de la paseja urbeto estas la grava teraso Ĝjujunggŭan. Sur ĝi sidis tri lamaismaj pagodoj. La teraso estas masonita el blankaj marmoraj ŝtonoj, kun alto de 9.5 metroj. La arkpordo de la paseja urbeto estas trairebla por veturiloj kaj ĉevaloj. Interne sur la pordarko ĉarmas multaj belaj gravuraĵoj. Sur la montaroj ĉirkaŭ la pasejo ondas prosperaj verdaĵoj kaj floroj, kun la titolo "Verda Pitoreskejo de Ĝjujunggŭan-pasejo" kaj estas unu el la ok pitoreskejoj de la antikva Pekino.

Pingŝinggŭan-pasejo, nordoriente de Fanĝi-gubernio kaj ĉe Lingĉiŭ-gubernio, Ŝanŝji-provinco, estis konstruita en 1511 kaj pligrandigita en 1581. Ĝia pordego rigardas orienten kun arkpordo 4 metrojn alta kaj 2.7 metrojn larĝa. La antikva vojo trairas la pasejon. Sur la pordego vidiĝas la ĉinaj ideografiaĵoj "Pingŝinggŭan-pasejo". Nun

la turo de la pasejo jam ne ekzistas. La restanta pasejo altas 6 metrojn. Ambaŭflanke de ĝi krutas montoj, kie serpentas la Granda Muro kaj estis la antikva batalejo en la ĉina historio. En 1938 la Ĉina Okavoja Armeo ekstermis pli ol 3 000 japanajn agresantojn de Itagaki-divizio en la loko 5 kilometrojn nordoriente de Pingŝinggŭan-pasejo, kio siatempe sensaciis en- kaj eksterlande.

Janmengŭan-pasejo, alia grava pasejo de la Granda Muro, sidas ĉe la monttalo de Janmen-monto, 20 kilometrojn nordokcidente de Dajŝjan-gubernio, Ŝanŝji-provinco kaj 115 kilometrojn oriente de Pingŝinggŭan-pasejo. Ĝi nomiĝas ankaŭ Ŝjiŝinggŭan-pasejo, kaj oni donis al Janmengŭan-, Ning'ugŭan- kaj Pjan-gŭan-pasejoj la komunan nomon Tri Pasejoj. Tang-dinastio (618 — 907 p. K.) konstruis pasejon



La teraso Ĝjujungŭan

ĉe la supro de Janmen-monto, kaj Ming-dinastio en 1374 translokis ĝin al la nuna pozicio. Ĝi estis trafike grava punkto inter

la nordo kaj sudo de Ŝanŝji-provinco. Proksime de la pasejo krutas montoj, la padoj serpentas inter ili kaj trairas la pase-

Ĝjajugŭan-pasejo



jon. La loko estas strategie grava kaj nun en ĝi restas nur 3 pordegoj de la pasejo.

Njangzigüan-pasejo, 45 kilometrojn nordoriente de la gubernia urbo de Pingding-gubernio, Ŝanŝji-provinco, estas la gorĝo de la provinco kaj unu el la famaj pasejoj de la Granda Muro. Ĝi konstruiĝis en la komenca periodo de Tang-dinastio. Legendo diras, ke la principo Pingjang, juna fratino de la imperiestro Tajzong (627-649 p. K. sur trono) de Tang-dinastio, kun virina taĉmento garnizonis tie, tial la loko ricevis la nomon (Njangzi ĉinlinge signifas virinon). La nuna pasejo estis konstruita de Ming-dinastio en 1542. Ĝi havas du pordegojn, inter kiuj estis kvartaloj. La ekstera pordego havas arkpordon el brikoj, supre de kiu estas teraso por revui armeon kaj observi malamikojn. La interna pordego el brikoj estas tre fortika. Ĝi havas turon ĉe sia supro. Ambaŭflanke de la pasejo serpentas la Granda Muro laŭ montoj, inter Ŝanŝji- kaj Hebej-provincoj. Norde de la pasejo torente fluas Taŭhe-rivero, kaj sude de ĝi ondas montoj.

Ĝjajugüan-pasejo, sudokcidente de la urbo Ĝjajugüan en Gansu-provinco, estas la okcidenta fino de la Granda Muro. En 1732 ĝi konstruiĝis sudoriente de Ĝjaju-monto, tial ĝi ricevis la nomon. Sude de ĝi kuŝas Ĉjiljan-montaro kun sen nombraj neĝpintoj blankaj kiel jado; norde de ĝi sidas la Drak-kapa kaj Ĉevalhara Montoj. Inter ili alte staras la paseja urbo. La muroj ambaŭflanke de ĝi trapasas Gobion kaj ligiĝas kun la du montoj. La urbeto, en trapeza formo kaj kun perimetro de 733 metroj kaj ĉirkaŭmuro alta 10 metrojn, havas po

unu pordegon en siaj orienta kaj okcidenta flankoj. La urbo havas turojn simetrie aranĝitajn. Ĉiu turo altas 17 metrojn kun turetoj en ĉiuj anguloj. La pordego estas ĉirkaŭita de citadelo. Meze de la suda kaj norda partoj de la ĉirkaŭmuro staras po unu gvatturo. La sudokcidenta urbomuro elstaras, kun pordego en la mezo, sur kiu vidiĝas la ĉinaj ideografiaĵoj "Ĝjajugüan-pasejo". Supre de la pordego sidis turo, simila al la orienta kaj okcidenta turoj. Okcidente de la urbeto staras kvadrata ĉirkaŭmuro el brikoj. La ĉirkaŭmuro el tero oriente, sude kaj norde ligiĝas kun la Granda Muro. La urbo estas ĉirkaŭita de duobla muro, kiu defendas la urbon, kaj pro tio ĝi ricevis la nomon Fortika Pasejo en la Mondo.

Uŝenggüan-pasejo, sude de la urbo Ŝinjang de Henan-provinco kaj ĉe la limo inter Henan- kaj Hubej-provincoj, estas unu el la enirejoj al Dabjeŝan-monto. Oni nomas Uŝenggüan-, Pingĝing-güan- kaj Ĝiŭligüan-pasejojn Tri Pasejoj de Jijang (Ŝinjang antikve havis la nomon Jijang). La lokon trairas la Pekin-Kantona Fervojo. Ĝi estas grava trapasejo inter sudo kaj nordo de Ĉinio kaj estis ankaŭ strategie grava loko por sudo kaj nordo de centra

Ĉinio. La restantaj citadeloj, fuortoj, fortikaĵoj kaj tranĉeoj ĉiuj simbolas la militojn okazintajn en la ĉina historio. Ĉirkaŭ Uŝenggüan-pasejo prosperas pinoj, ĉinaj abioj, fruktarboj, bambuoj kaj tearboj, kiuj ĝuigas belan vidon.

Joŭjigüan-pasejo, 18 kilometrojn sudokcidente de la urbo Pingŝjang en la Gŭangŝji-a Ĝŭang-nacieca Aŭtonoma Regiono, estas la landlima pasejo inter Ĉinio kaj Vjetnamio. En historio ĝia nomo multfoje ŝanĝiĝis kaj en 1965 ĝi ricevis la nunan nomon. Oni nomas Joŭjigüan-, Ŝujkoŭgüan- kaj Ping'ergüan-pasejojn Tri Pasejoj. La Hunan-Gŭangŝji-a Fervojo trairas Joŭjigüan-pasejon, tial ĝi estas unu el la gravaj pasejoj inter Ĉinio kaj Vjetnamio. La turo sur Joŭjigüan-pasejo estis konstruita en 1725 kaj poste forbruligita en milito. La rekonstruita turo estis refoje detruita en la Kontraŭjapana Rezistmilito. La grandioza trietaĝa turo, rekonstruita en 1965, staras ĉe la landlimo inter Ĉinio kaj Vjetnamio. Sur la tabulo de la turo estas la ĉinaj ideografiaĵoj "Joŭjigüan-pasejo", kiuj estis skribitaj de marŝalo Ĉen Ji (1901 — 1972), antaŭa ministro de la Ministerio de Eksteraj Aferoj de la Ĉina Popola Respubliko. □







KONDOLENCO

D-ro Istvan Szerdahelyi, estro de la Esperanto-fako en Universitato de Budapest, vicprezidanto de la Hungara Esperanto-Asocio kaj ano de la Akademio de Esperanto, forpasis je la 21-a de aŭgusto 1987. Tio alportis grandan perdon al la Esperanto-movado en Hungario.

La redakcio de El Popola Ĉinio sendas al la familianoj de d-ro Szerdahelyi koran kondolencon kaj al la Hungara Esperanto-Asocio sinceran kunsenton.

Vidindaĵoj de Hŭangŝan-monto

de LU DONG



Hŭangŝan-monto en Anhuj-provinco estas fama vidindejo de Ĉinio kaj de la mondo. Sur la ĉielskra-

pantaj montpintoj kreskas pinoj, inter kiuj ŝvebas nuboj. Ĉie vidiĝas groteskaj rokoj kaj tutjare ŝprucas termofontoj. Tial, de antikve oni nomas "kvar mirindaĵoj" la rarajn pinojn, groteskajn rokojn, nubojn kaj termofontojn de Hŭangŝan-monto. La poŝtmarko-serio, emisiita la 5-an de oktobro 1963, prezentas la 16 vidindaĵojn de la monto.



MS18